

# Eŭropa Bulteno

Majo-junio 2009, № 5-6 (82-83)

## 8-A KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO EN ESPERANTO-URBO

La 8-a kongreso de EEU okazis samtempe kaj samurbe kun la 86-a kongreso de germanaj esperantistoj de la 28-a de majo ĝis la 2-a de junio 2009 en Herzberg am Harz, Esperanto-urbo (Germanio). Partoprenis pli ol 400 personoj se oni kalkulas ankaŭ kelkajn junularajn grupojn kaj ensemblojn kiuj venis organizite por partopreni en kultura programo (el Hungario, Pollando kaj Germanio), sed estis ĉirkaŭ 300 veraj kongresanoj el dudeko da landoj eĉ el kelkaj ekstereŭropaj. La kongreso havis kelkajn aspektojn relative nekutimajn. Unue pro tio ke temis pri la plej granda esperantista aranĝo en Esperanto-Urbo entute ĝis nun, necesis iom da agado por la urbanoj. Tion oni aranĝis diversmaniere sed la plej grava estis dimanĉa evento kiam en la tradicia urba parado pentekoste partoprenis preskaŭ la tuta kongresanaro portante diversajn insignojn (verdajn ombrelojn, E-flagojn kaj ankaŭ po unu nacia flago de landoj partoprenintaj. La tuta urbanaro aŭ partoprenis aŭ salutis la paradon. Alia specifo estis ke estis eĉ tro da kulturaj programoj. La malferma ceremonio daŭris 4 horojn kun prezento de pluraj ensembloj, parolantoj kaj kantistoj.



kaj kantistoj. Inter la plej bonaj kulturaĵoj certe estis pupteatra spektaklo de profesia pupisto Christoph Frank, kiu ludis Baronon Muenchhausen-on en bona Esperanto. La spektaklo estis lerta, profesia kun tre bona animado de po 3 pupoj samtempe kaj tre bona voĉanimado. Mi ĝuis post multaj jaroj denove unu bonan pupteatraĵon en Esperanto kaj proponos ĝin al PIF en Zagrebo. Inter multaj prelegoj mi ĉeestis kaj estis pro tio tre kontenta la prelegojn de d-ro Zbignew Galor pri naciaj stereotipoj, de Petro Balaž pri E@I kaj de Yves Nevelsten pri Vikipedio. Mi mem prelegis pri Strategio por Esperanto en Eŭropa Unio

kaj Sean pri la politika evoluo en Germanio aparte post la falo de la Berlina muro kaj pri rilatoj al Esperanto.

La labora flanko de la kongreso estis ankaŭ kontentiga. Okazis ĉiuj planitaj aranĝoj. Unue kunsidis la estraro de EEU, kiu decidis pri transdono de la honora membreco de EEU por la jaro 2009 al urbestro de Herzberg, sinjoro Gerhard Walter pro lia granda merito konvinki la urban konsilantaron proklami la urbon Esperanto-urbo, la unua tia en la mondo. Poste la estraro traktis du kandidatojn por la sekva kongreso de EEU en 2011 kaj akceptis la inviton de la urbo Galway en Irlando. Ni lasis la decidon pri konkretaj datoj al la organizantoj post kiam ili eventuale interkonsentos kun Brita E-Asocio por eventuale samtempe organizi samloke ankaŭ la britan E-kongreson.



Poste ni havis malferman asemblean kunvenon en kiu ĉeestis ĉirkaŭ 30 personoj kaj en kiu ni prezentis nian raporton pri aktivecoj en 2008 kaj diskutis pri diversaj ideoj por la estonto.

Dimanĉon okazis la oficiala kunsido de la asembleo kun partoprenanto de delegitoj el 15 landoj. Ĝi akceptis la raportojn pri 2008 kaj la laborplanon por 2009. Oni diskutis ankaŭ pri partopreno en germanfranca kongreso en Kaiserslautern en 2010 kaj pri okazigo de la asemblea kunsido tie.

Aparte okazis kunveno inter la estraro de EEU kaj la

Hamburga E-societo pri okazigo de aparta eŭropa konferenco en 2011 por kiu EEU kaj HES kune starigos peton pri financado al Eŭropa Unio.

Oni tuŝis ankaŭ neceson kunlabori kun diversaj organizoj kaj eĉ politikaj partioj kiuj havas en sia programo lingvan demandon kaj aparte salutis la partion EDE kiu kandidatiĝis por la balotoj por la Eŭropa Parlamento en Francio kaj Germanio. Ni kun ĝojo informiĝis ankaŭ pri tio ke la ŝanco ke Margareta Handzlik denove sukcesu pri la membreco en Eŭropa Parlamento estas praktike 99%. La plano de EEU por 2009 antaŭvidas reteni profesion postenon en minimuma formo por povi efektiviĝi novajn petojn, planojn kaj projektojn, plu zorgi pri iniciatoj en Eŭropa Parlamento, partopreni en prilingvaj aranĝoj de Eŭropaj instancoj, eldoni Eŭropan Bultenon, prepari novajn projektojn rilate konkursojn de EACEA kaj pliintensigi la kunlaboron kun la landaj asocioj. Tiucele la asembleo starigis komisionon pri landaj asocioj konsistanta el 6 personoj kiuj zorgos ĉiu aparte pri kelkaj landoj de sia regiono. La precizajn nomojn de la komisionoj ni konfirmos post la kontaktado kun la proponitoj.



**Zlatko Tišljar**

## LA KOMUNA KONGRESO DE GEA KAJ EEU EN HERZBERG

La komuna kongreso de GEA kaj EEU en Herzberg - la Esperanto-urbo finiĝis antaŭ unu monato kun bonaj rezultoj, postsekvoj. Krom pluraj tujaj amasmediaj informoj (multaj gazetartikoloj, radio-raportoj, intervjuoj), nun ankaŭ en la E-aj gazetoj aperadas fotoj kaj informoj. Sur la titolpaĝoj de 'Esperanto-aktuell' kaj 'REVUO ESPERANTO' oni povas vidi fotojn dum la parado (procesio) tra la nova Esperanto-urbo Herzberg (dank' al Alfred Schubert kaj Stano Marcek). Estis bone, ke la Esperanto-movado iom forlasis sian kutime fermitan kongresejon. Multaj homoj en Herzberg vidis amason da esperantlingvaj parolantoj, bonan varbefikon havis la kunportitaj naciaj kaj verdaj E- flagoj, same la okulfrapaj varbombreloj kun la blankaj literoj ESPERANTO (dankon al la E-grupo "Unterweser").

La raportojn, bildojn ni kolektas sur la kongresa hejmpaĝo, bv. viziti:  
<http://gek-EEK.esperanto-urbo.de/page.php?pid=61051313>

Se vi estis partoprenanto, memoru la kongresajn eventojn, se ne, vidu, kion vi maltrafis!  
 Jen resumaj raportoj el la vidpunktoj de:

### 1. Prelegoj, fakaj temoj dum GEK/EEK

- Prelego pri Kubo, Juan Besada
- Prezento pri Kuba historio: Juan Besada
- Lumbildoj pri Esperanto-rondvojaĝo tra Azio: Mireille Grosjean
- Jim la migrulo: Libroprezento far prof-ro Rüdiger Sachs kaj informoj pri Serengeti-nacioparko
- Pri la gazeto Juna amiko : Stefan MacGill
- Naciaj stereotipoj kaj eŭropa identeco Zbygniew Galor
- Esperanto kiel mapilo inter du kulturoj kadre de trilingva temovortaro: D-ino Ilona Koutny
- Aktivecoj de Germana Esperanto-Junularo: Julia Hell
- Prelegoj: 20 jaroj post la murfalo En la jaro 1989 falis la muro inter oriento kaj okcidento.
- Festprelego: D-ro Sean O'Riain
- Strategio de EEU en poresperanta agado en Eŭropa Unio: Zlatko Tišljar
- Informoj pri AIS, D-ino Verá Barandovská-Frank
- La vojo al la unuiĝo de la du Germanaj Esperanto-Asocioj en la 90aj jaroj: d-ro Rudolf Fischer
- Personaj spertoj el nia iama limoregiono: Peter Zilvar
- Ĉu interkompreniĝo eblas malgraŭ miskomprenoj inter okcidentanoj kaj orientanoj? Elisabeth Schwarzer
- Kiel ŝanĝiĝis la percepto pri orienta Eŭropo ĉe la esperantlingvaj okcidentanoj? Giorgio Silfer
- Ekstermovada aplikado de Esperanto: Zdzislaw Glajcar
- Kaiserslautern la venontjara kongresurbo sin prezentas
- Purakore: poemaro de hungara poeto Attila József: Imre Szabó
- Nova universitata Esperanto trejnado en Szeged, Hungario: dr. Újvári Edit
- Lernu.net: Peter Balaz



- Seminario pri E@I: Peter Balaž
- Trejnseminario pri Vikipedio: Yves Nevelsteen
- Komputeko: Yves Nevelsteen
- Retvortaro: pastro Albrecht Kronenberger
- Prelego pri filmado: Sebastian Kirf
- Eŭro en Ĉeĥio & ĉeĥa prezidentaĵo en EU
- Prelego pri libro Esperanto per rekta metodo : Stano Marcek
- Informoj pri la saniga efiko de ginsengo: Harald Schicke
- Vojaĝoj al ambaŭ koreaj landoj: Harald Schicke
- Fakprelego pri biero kun biergustumado: Harald Schicke
- Verduloj & Esperanto / Verda Ekonomio: Dr. Manfred Westermayer
- Homeopatio (mirakla sanigo): Kees Ruig
- Informoj pri GEK/EEK 2009 & Esperanto-urbo kaj EEU: Peter Zilvar, Zsófia Kóródy
- Komuna elkonstruo de Herzberg la Esperanto-urbo. Forumo kun diskutado
- Privilegia vojo: Persistema klerigado far GEA-filio en Herzberg (kiel akiri valorajn fakdiplomojn de GEA), Peter Zilvar, Zsófia Kóródy
- Nova ĉeĥa Esperanto-muzeo: d-ro Petro Chrdle
- Ekonomia Esperanto: Hans Welling
- Ĝenerala kono de Esperanto en Francio: Cyrille Hurstel
- Ekspozicio pri Esperanto-filatelio kaj raraj E-kolektobjektoj (absoluta pinto, eksterordinara evento), Stany Rynduch
- Esperanto-ekspozicio en la kavalira salono de la Kastelo (Kun speciala Esperanto-kolektaĵo de filatelisto Kurt Zietz el Herzberg)



## 2. Kunsidoj

EEU-kunsido, EEU-sembleo

- Jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio (GEA)
- GEA: Landaj Ligoj (LALI): diskuto pri la estonto de la germana Esperanto-movado
- Jarĉefkunveno de E. Landa-Ligo en Malsupra Saksio (EMAS) Thomas Heberlein
- Kunsido de Landa Ligo REVELO
- Kunsido de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI): Zsófia Kóródy
- ILERA + AREF (Esperanto-Kolektanoj kaj Filatelistoj)

## 3. Ekskursoj

- Ekskurso per aŭtoj al Unukornulo-Groto (Einhornhöhle) en Scharzfeld
- Gvidado tra la Esperanto-urbo kun vizito de la kastela muzeo kaj de la speciala Esperanto-ekspozicio
- Gvidata promenado sur la rondvojo Akvo-8
- Matenaj kur-horoj kun Henryk Wenzel
- Busekskurso tra la Harz-montaro al Goslar, urbo de mondkulturheredaĵo





- Busekskurso al la Eŭropa Rozario en Sangerhausen, poste vizito al la grandega Kyffhäuser-Monumento
- Komuna trajnekskurso al Braunschweig kun gvidado, vizito de muzeoj kaj historia malnovurbo

Kromaj rekomendoj estis:

komunaj ekskursoj, ekz. al la Rhume-fonto kaj al la historia urbo Duderstadt (20 km) aŭ Göttingen (35 km). Migrado sur la proksima monto Knollen, al Hanskühnenburg ĉe Lonau.

#### 4. Kulturaj kaj distraj programofertoj

- Boule-ludado ĉe la Boule-ludejo apud Jues-lago
- Interkona vespero sub gvidado de kantisto Ralph Glomp
- Grekaj kantoj de German-Greka Koruso el Herzberg
- La internacia Esperanto-Koruso, (projekto Vielfalt tut gut - Bunteco bonas) sub gvido de Otto Kern
- Muzikgrupoj de la gimnazio (lerneja koruso: Christian Gödeke; instrumenta grupo: Gitta Ammer)
- RYTMIX Infana Dancensemblo el Toruno
- SZENÁ-TOROK La hungara parlamenta koruso
- Georgo Handzlik la Esperanto-bardo kantas
- Speciala junulara muzikprogramo en la urba junulardomo kun la diskĵokeoj Erik & Leo, junularprogramo sub gvidado de Julia Hell, GEJ-prezidantino



- Filatelista evento, aparta poŝtstampo pro la E-kongreso
- Ekspozicio pri Esperanto-filatelo en la urba biblioteko
- Ekumena Diservo, pastro Albrecht Kronenberger kaj pastoro Peter Bäß, Sankta Jozefo-Kirko
- Bunta kulturvespero -Ulrich Mattke Pianoludado, Alfons Hoffmann Kantado, Harzklub Pöhlde prezentas sin, Ralph Glomp, fama E-kantisto el Hamburgo, Klezmorim Sennomaj sub gvido de Peter Bäß el Berlin
- Komuna kantado de Internacia Esperanto-Koruso kun ĉ. 100 infanoj kaj plenkreskuloj sur bazara placo apud la urbodomo, (projekto Vielfalt tut gut - Bunteco bonas) sub gvido de Otto Kern
- Partopreno ĉe la urba festparado, kun kostumoj, flagoj, varbombreloj
- Teatra vespero: Münchhausen la vera kazo. Teatra spektaklo, Christoph Frank
- Aŭkcio de libroj kaj brokantaĵoj je favoro de Esperanto-urbo
- Bunta adiaŭa vespero (gvidis Stany Rynduch), Dancprezentado de la premiita grupo Baby Jagi el Toruno, Georgo Handzlik la Esperanto-bardo, unuopuloj kaj grupoj
- Adiaŭa piroteknikaĵo

**Peter Zilvar, Zsófia Kóródy**

## SVEDA ESPERANTO-KONGRESO

La Sveda Esperanto-kongreso estas kunlaboro inter esperantoorganizoj en Svedio. La kongreso okazis 22-24-an de majo 2009 en popolaltlernejo de Fornby en Borlänge, Dalekarlajo. Ĉirkaŭ 60 personoj ĉeestis kaj okazis dum tiuj tagoj samloke ankaŭ kunvenojn de svedaj esperanto organizoj.

- SEF, Sveda Esperanto-Federacio , havis sian jarkunvenon
- SEJU, Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo, havis sian Anemona renkontiĝo
- ELDONA, Eldona Societo Esperanto - havis sian jarkunvenon
- E-G, Esperanto-Gården (E-G), havis malfruan jarkunvenon
- ILEI-se, Sveda sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, havis ne jarkunveno sed membrokunveno
- SEI, Sveda Esperanto-Instituto (SEI), havis sian jarkunvenon kaj aranĝis plankunveno kun gruplaboroj
- KELI, Sveda sekcio de KELI, havis sian jarkunvenon



Inter tre interesaj programeroj estis prelegoj:

- Projekto Lingvolanĉilo (angle "Springboard to Languages") de sinjoro Paŭlo Gubbins el Britujo. Tiu prelego estas vere imitinda kaj ripetinda multloke en aliaj landoj!
- Ĝardena fervojkonstrua projekto de sinjoro Paŭlo Gubbins el Britujo. Amuza prezento pri ĝi, kun multaj bonaj fotoj, kelkaj surprizaj. Vidu pli ĉe Youtube: "Garden Railway - Roundhouse Lady Anne first run SM32 16mm"
- Lingvolernado en la interreto de sinjoro Konstantin Andreev el Rusio kaj Svedio. Prelego impona de ruso kiu loĝas de antaŭ unu kaj duona jaroj en Svedio kaj antaŭ nur du monatoj kaj dek tagoj komencis lerni esperanton. Ĉiujn aŭskultantojn imponis lian flue bonan lingvonivelon. La temo de la prelego estis grava; ĝi temis pri lingvolernado per interreto, en kiu altlernejo (universitato) de Faluno estas elstare sukcesa kaj havas studentojn en diversaj kontinentoj kaj eĉ atingis organizi por svedoj kurson pri la kopta (praegipta) lingvo. La evidentaj demandoj estis, kiel oni povas tian sukceson realigi ankaŭ por esperanto, kaj kiel eblas kupli tion al nia kara lernu.net.

Aliaj programeroj estis:

- Librotablo – prizorgis Karin kaj Thomas Tulkiewicz
- Kurso por komencantoj – prizorgis Roland Lindblom
- Distraĵo, komuna kantado, komuna dancado, folkloro muziko – prizorgis Mheddi Martin Strid

La impreson estis ke la partoprenantoj kontentis pri la kongreso kaj ŝatis ĝian etoson.

**Kaisa Hansen**

## ELEKTO DE LA EŬROPA PARLAMENTO (EP) 2009

### Mesaĝo de la Prezidanto de EEU

La elektoj en la 27 EU-landoj komence de junio 2009 donas ege gravan okazon al la Esperanto-movado en Eŭropo: ŝancon rekte influi la lingvopolitikon de EU. Nepre necesas pligrandigi la nombron de subtenantoj de lingva justeco, kaj do de simpatiantoj pri ia rolo por Esperanto, inter la eŭrodeputitoj. En la nuna EP EEU honorigis la du deputitojn kiuj plej multe subtenis niajn ideojn, kaj ni esperas ke ili ambaŭ reelektiĝos: Margareta Handzlik el Pollando kaj Ljudmila Novak el Slovenio.

Ekde la lasta EP-elekto en junio 2004 okazis afero kiu jam tre gravis en si mem, sed kiu eĉ pligraviĝis pro la nuna profunda internacia ekonomika krizo: la publikigo de la Raporto Grin.

Tiu raporto, kiun verkis profesoro François Grin de la Universitato de Ĝenevo fine de 2005, montris du interesajn aferojn:

1. EU perdas €25 miliardojn jare pro la rifuzo doni rolon al Esperanto.
2. La nuna internacia dominado de la angla lingvo faras financajn transferojn de €17-18 miliardojn jare al Britio.

Tre gravas ke la landaj asocioj de UEA skribu petante reagon pri tiuj du faktoj de kandidatoj en la EP-elektoj. La unua fakto koncernas ĉiujn 27 EU-landojn, la dua estas pli taŭga por kampanjo en la 25 ne-anglalingvaj landoj. Baze de tiuj du faktoj, oni povas facile prepari demandojn al deputitoj kaj estontaj deputatoj, ekzemple:

Tra la tuta EU: “Ĉu vi, malgraŭ la nuna financa kaj ekonomia krizo, konsentas ke EU daŭrigu la perdadon de €25 miliardoj jare? Kion fakte donas al ni tiu ege multekosta antaŭjuĝo kontraŭ Esperanto? Ĉu vi akceptas, aŭ malakceptas, la koncepton de lingva justeco, t.e. ke ĉiu civitano havas egalan valoron, sendepende de sia denaska lingvo?”

En la 25 ne-anglalingvaj EU-landoj: “Ĉu vi konsentas kun la nuna gajnado de €17 miliardoj jare fare de Britio kaj Irlando? Se jes, ĉu vi do akceptas ke germanoj/francoj/italoj/hispanoj/poloj, ktp dum la tuta vivo financu Brition? Ĉu viaj samlandanoj meritas vivolongan monpunon pri la krimo ke ili ne naskiĝis en Britio aŭ Irlando?”

Oni aldone menciui la brilan britan projekton, “Springboard”, kiu instruas limigitan kvanton de Esperanto cele al plibonigo de lingvolernado ĝenerale: tio efike nuligas la antaŭjuĝon ke Esperantistoj intencas forigi aliajn lingvojn. Dek tagoj antaŭ lia tragika morto en akcidento julie 2008, la lasta mesaĝo de Vicprezidanto de Eŭropa Parlamento Geremek al siaj 784 kolegoj estis invito al diskuto pri la temo “Esperanto: malamiko aŭ amiko de plurlingveco? Kaj kiam oni rilatas kun subtenantoj de eŭropa integriĝo, oni substreku la potencialon de Esperanto plifortigi tuteŭropan identecon harmonie kun naciaj kaj regionaj identecoj. En la vortoj de Geremek: “Ni kreis Eŭropon: nun ni devas krei eŭropanojn.”

EEU rekomendas ke la landaj asocioj en EU-landoj kontaktu kandidatojn por la EP-elektoj kiom eble plej frue, kaj starigu al ili tiajn konkretajn demandojn, aŭ aliajn laŭ la specifaj kondiĉoj de la lando. Se ni volas esti efikaj, ni devus peti subtenon por la kandidatoj, sendepende de politika partio, kiuj subtenas lingvan justecon. Kaj ni devus ankaŭ diskonigi la respondojn kiujn ni ricevus, kaj la nomojn de kandidatoj kiuj ne respondas. La voĉdonantoj rajtas scii la sintenon de kandidatoj pri tiuj gravaj demandoj, kiuj havas tiom grandajn financajn sekvojn. Nia movado havas devon informiĝi pri tio, kaj informi la voĉdonantojn. Poste ili mem decidu!

**Seán Ó Riain**

## EDE SUR LA FLANKO DE LA KRESKANTAJ PARTIOJ EN LA EU

La franca kaj germana EDE (Eŭropo Demokratio Esperanto) estas je la flanko de la gajnintaj partioj ĉe la Eŭropaj Balotoj.

Sed ne en la sama direkto kiel la plejmultaj, precipe nacie konservativaj, ofte eĉ dekstre radikalaj partioj. EDE kreskis (se ankaŭ nur minimume sed tamen) naĝante kontraŭ la nuntempe ĝenerala kontraŭeŭropa fluo, por Eŭropo.

EDE povis modeste kreski sur la flanko de la meza racio de la internacieco. Ankaŭ se tiu strebo estas kontraŭ la ĝenerala intenco nuntempe en la EU, ĝi tre gravas por la protekto kaj defendo de la demokratio ĝenerale por ne perdi la ŝancon rekonstrui nian oldan Eŭropon, per nova internacia demokratio.

En Francio la EDE akiris plus 4.0010 voĉojn, aŭ 0,02 % pli ol 2004.

En Germanio la EDE akiris plus 11.859, aŭ 0,045 % pli da voĉoj ol 2004, kiam ili ne povis partopreni la balotojn ĉar ne atingis la nombron de la necesaj subskriboj.

Ankaŭ se la EDE-anoj ĝenerale esperis ricevi pli da voĉoj, se oni analizas la cirkonstancojn en kiuj ili faris sian kampanjon kaj komparas iliajn eblojn kun la aliaj partioj, oni devas esti kontenta kun la atingita rezulto.

En Germanio ekzistas ekzemple nur 30 aktivaj EDE-anoj kaj ili elspezis por la balotoj ne plu ol 10.000 eŭroj. Por la komparo: CDU, la nun plej granda partio en Germanio, elspezis 1.000.000 eŭrojn por la eŭropaj balotoj. Malgranda alia kalkulo: Ĉe la EDE venas 400 voĉoj al unu membro. Por komparo; ĉe la verduloj 70 voĉoj/membro.

Bedaŭrinde eĉ grandaj demokratiaj partioj menciis apud la plejparte naciaj temoj nur rande tuteŭropajn problemojn kaj interesojn (ni ne forgesu ĉe Eŭropaj Balotoj). En la tuta Eŭropa Unio alparolis nur du kandidatoj la internacian demokration, la EDE kaj la Newropeans, tiuj ankaŭ nur en Francio kaj Germanio. Fakte jes, la plej grandaj kaj evoluintaj landoj en la EU, sed tamen ankaŭ eĉ tie montriĝis en la demokratia baloto la malalta ĝenerala nivelo de la internacia konscio de la civitanoj.

Pro tio, se ni en la estonto plu volas havi Eŭropan Union kaj ĝin surkonstrui al demokratie vivkapabla lando de la mondo, ni havos ankoraŭ multe da laboron. Ĉiuj tiuj, kiuj jam havas kelkajn internaciajn spertojn kaj atingis iun internacian konscion, tion pludoni kaj helpi al tiuj civitanoj kiuj ĝis nun ne havis la eblojn por tiuj spertoj. Oni povas diversmaniere komenci evolui tion konscion, la plej senpere alirebla estas por la plejmulte da civitanoj, demokratie, per Esperanto. Pro tio havas EDE en sia programo, kiel unu el la plej gravaj taskoj, per la politiko disvastigi Esperanton en la Eŭropa Unio.

### Eŭgeno Macko

#### EDE en Alzaco

Sekve al la balotado ni ricevas bonajn novaĵojn el Alzaco. Ekde septembro Esperanto estos enkondukita kiel studfako en la universitato de Mulhausen kiel volontula paroliga kurso por oficistoj de la Konsilode Europano (Sidejo en Strasburgo) en la kadro de aktivaĵoj, kiujn la unuiĝo de la Eŭropkonsiliaj kunmembroj proponas al la lokaj oficistoj. Ankaŭ mi aŭdis, ke ne-malmultaj instruistoj de la Strasburga universitato ŝatus sin dediĉi por sekvi la instruadon de Esperanto.

Ĉi-tiu novaĵo estas des pli entuziasmiga, ĉar Strasburgo iel estas Eŭropa urbo (kun institucioj de Eŭropa Parlamento).

### Fabien Tschudy



## ANALIZO DE EU-KONSULTIĜOJ LAŬ TEMOJ

**Prenate en konsideron unuajn kvin temojn en 22 EU-landoj (mankas Latvio, Litovio, Grekio, Cipro kaj Malto) jen la ranglisto de temoj trovitaj:**

1. Esperanto: konsideri Esperanton kiel lingva helpilo en EU : 22 landoj el kiuj en 16 je unua pozicio
2. Leĝigo de marihuano (en 9 landoj el kio en 2 landoj 1-a pozicio)
3. Starigo de agentejo por kontroli impostojn en 7 landoj (neniu unua pozicio)
4. Pli da okupiĝado kaj financado de ekologiaj temoj (en 6 landoj)
5. Solvi la financekonomian krizon (en 5 landoj)
6. Batalo kontraŭ malriĉeco (en 5 landoj)
7. Fari pli por evoluigi volontulecon (en 3 landoj)
8. Lerni pri Eŭropo en lernejoj (en 3 landoj)
9. Rekoni rajtojn de bestoj (en 3 landoj)
10. Batalo kontraŭ diskriminacio de virinoj (2)
11. Pli da socialaj rajtoj (2)
12. Forigi nukleajn elektrajn centralojn (2)
13. Fini subvencii agrikulturon (2)
14. Doni laboron al gejunuloj (1)
15. Garantii bazajn 4 liberojn (1)
16. Lerni pri solidareco (1)
17. Batali kontraŭ genetike prilaboritaj nutraĵoj (1)
18. Nuligi koridojn (1)
19. Fari en EU zonon sen OGM (FR) (1)
20. Permesi abortigon (1)
21. Pli zorgi pri homaj rajtoj (1)
22. Homaj rajtoj por nenaskitoj (1)
23. Malpli da trafiko por purigi la aeron (1)
24. Eŭropa Parlamento sen »dondannati« (IT) (1)
25. Infana vilaĝo por eŭropaj civitanoj (1)
26. Malpermesi »rook« (NL) (1)
27. Eŭro (PL) (1)
28. Solvi energoproblemon pri gaso (1)
29. Eduki pri komuna eŭropa historio (1)
30. Rreligio en lernejojn (1)
31. Salajroj egalaj kun EU (1)
32. Pli altaj pensioj (1)
33. Batalo kontraŭ korupto (1)
34. Defendo de konsumantaj rajtoj (1)
35. Uzi liberan softvaron en administrado (1)
36. Sankcii monopolon en telekomunikado (1)
37. Medicino patentoj ? (Sv) (1)
38. Starigi profesion el edukado de infanoj hejme (1)
39. Fortigi demokration (1)
40. Haltigi ŝtatan burokrativastiĝon (1)

Mi ne analizis 5 landojn ĉefe pro tio ke iliajn lingvojn mi neniel povis deĉifri.

Restis 11 temoj en la menciitaj 22 landoj kiujn mi ne komprenis (verŝajne ili ne grave ŝanĝus la rangordon).

Evidentos por EU ke por Esperanto okazis organizita kampanjo (speciale en Hungario kie unuajn 4 poziciojn okupis 4 diversaj proponoj pri Esperanto), sed ĝi devus signali al la EU-ĉefuloj ke Esperantistoj estas grava forto, ĉar ili kapablas engaĝi tiom da interesitoj por sia afero.

Evidentos ankaŭ ke kampanjon organizis iu grupo kiu en 7 landoj voĉdonigis kvardekon da homoj por sia propono pri starigo de Eŭropa Agentejo por kontroli impostojn – kio montras efektive kiel febla estas tia maniero esplori la publikan opinion, se nur 40 homoj povas esence influi la statistikon. Eĉ la fakto ke en Francio voĉdonis preskaŭ 800 homoj por Esperanto, dum la unua propono ricevis iom pli ol 3000 kaj sekve Esperanto gajnis 25% da voĉoj kompare kun la plej forta propono – montras ke pri tiaspecaj enketoj interesiĝas tre malmultaj civitanoj. Entute

laŭ mi en la voĉdonado partoprenis ĉirkaŭ 100.000 homoj kio estas 0,5 promiloj aŭ 0,05 % de la eŭropa loĝantaro.

Se ni sumas la tutan voĉdonantaron por ĉiuj Esperanto-proponoj en la 22 landoj ni ricevas 5262 voĉojn kio estas en la tuta sumo de voĉoj 5%. Se ni ricevus 5% da voĉoj en balotoj, nia partio rajtus eniri la parlamenton! Inter tiuj voĉoj estas ĉirkaŭ 100 personoj kiuj voĉdonis solidarece en preskaŭ ĉiuj listoj. El tiu kaj similaj voĉdonadoj en aliaj poresperantaj proponoj en kiuj simile kelkmil esperantistoj voĉdonis, mi povas konkludi ke ekzistas ĉirkaŭ 3-4000 esperantistoj en interreto kiuj aktive sekvas la okazadojn kaj kunlaboras en la interreto. Tion konfirmas ankaŭ la blogaro ipernity en kiu membras plej granda kvanto da esperantistoj kun ĉirkaŭ 3000 membroj kaj ankaŭ la fakto ke ekzistas ĉirkaŭ 300 diversaj elektronikaj listoj en kiuj membras de kelkdeko ĝis kelkcento da membroj.

Mirindaĵo estas unuaj pozicioj por Esperanto en grandegaj landoj kia Germanio, Italio kaj Britio. Tio montras antaŭ ĉio katastrofe malaltan intereson de tiuj popoloj por Eŭropa Unio kaj aktiva civitaneco.

**Zlatko Tišljarić**

## ESPERANTO EN LA BIBLIOTEKOJN EN ITALIO



Itala Esperanto-Federacio jam de longa tempo zorgas pri kontaktoj kun italaj bibliotekoj kaj kelkaj el ili regule ricevas la italan Esperanto-revuon.

En la pasinta jaro la Nacia Konsilantaro de IEF lanĉis kampanjon por donaci librojn pri Esperanto al bibliotekaj pretaj akcepti ilin. La kampanjon kunordigis la nacia konsilanto Ermigi Rodari, kiu pere de lokaj esperantistoj enketis pri la emo de la bibliotekoj ricevi librojn pri Esperanto kaj meti ilin en la bibliotekan katalogon. La sukceso estis rimarkinda.

109 bibliotekoj akceptis niajn librojn kaj la direktoroj de kelkaj el ili eĉ dankis skribe.

Oni donacis 86 lernolibrojn de Migliorini, 107 vortarojn Corsetti-Vessella, 106 ekzemplerojn de la

verko de Janton en la itala, "Esperanto: lingua, letteratura, movimento" kaj ankaŭ kelkaj aliaj verkoj al bibliotekoj, kiuj jam posedis unu el la unue cititaj verkoj.

Kompreneble oni ankaŭ donacis abonojn al la itala Esperanto-revuo por la bibliotekoj, kiuj petis tion.

La pozitiva sperto instigas al aliaj similaj agadoj. Gravega estas la rolo kaj de la kunordiganto kaj de la lokaj esperantistoj, kiuj plenumas la esencajn lokajn kontaktojn.

**Renato Corsetti**

## AVE - 25 JAROJ DA KUNLABORO KUN LA VERDAJ PARTIOJ TUTMONDE



AVE estis fondita en Marto de 1984 en Lishge (Belgio) okaze de la unua renkontiĝo de la Eŭropaj Verdaj Partioj. El la fondintoj: Maire Mullarney (1922 - 2008, la koro de AVE, kunfondinto de la irlanda Verda Partio), Christopher Fettes (unua redaktoro de AVE-NOvaĵoj, AVENO), Jean-Claude Thumerelle (unua sekretario), Wolfgang Guenther, Ute Haas, Emilo Mas kaj Claude Rouget (kiu eldonis VERDire). AVE-anoj kunvenas enkadre de la kongresoj de la Eŭropaj kaj Tutmondaj Verdaj Partioj. Bonkvalita interpretado de la ĉefaj prelegoj i.a. en Esperanton okazis 1991 je la unua Eŭropa Kongreso de la Verdaj Partioj en Zuriko fare de Claude Gacon kaj Claude Piron, kion ebligis niaj geamikoj el Francio kaj la svisa Verdulo Hans Beat Schaffner. Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne estas tiom multaj por postuli tion regule. AVE k.a. almenaŭ sukcesis ke la Eŭropaj Verduloj akceptis kelkajn rezoluciojn favore al la uzado

de Esperanto en la Eŭropa Unio. La franca (1999) kaj la germana (2009\*) Verda Partio enmetis Esperanton en siajn Eŭropo-Programojn. Aliflanke AVE tradukas gravajn dokumentojn de la Verdaj Partioj, inkluzive de iliaj Eŭropa kaj Tutmonda Organizaĵoj, kaj tiel ankriĝas per ret-ligoj en iliaj retejoj. Je la kongreso en Zuriko Manfred Westermayer transprenis la AVE-sekretarion. Dum la AVE-kunsido 2003 en Gotenburgo, okaze de la 88a UK, majoritato konfirmis la neformalan statuson de AVE, kio poste estis konfirmita per voĉdono inter la membroj. Tiel ni evitas burokratajn aferojn. Pere de la tradukado de gravaj Verdulaj dokumentoj ni informas la samideanojn pri la Verda Alternativo cele al daŭrigebla estonteco, kaj aliflanke ni montras al la Verduloj ke Esperanto kun siaj neŭtraleca lingvo kaj malpeza sed bonkvalita strukturo optimale agordas al la Verda ideologio de paca kunvivado kaj ekologia daŭropoveco. Kompreneble AVE kunlaboras ankaŭ kun diversaj Esperanto-Organizaĵoj kiel UEA, SAT kaj EEU; kaj regule AVE kontribuas pere de kunsidoj kaj prelegoj enkadre de iliaj kongresoj, ekz-e en Maribor (EEU 2007) pri la temo "Akvo kaj plastajoj". i ankaŭ kunvenis enkadre de ekologiaj okazaĵoj kiel "Ekologio kaj Turismo" (Riga) kaj kunvenos 2009-08-22 okaze de "Ekotur" (Svitavy, org-o: P. Chrdle). Rilate Eŭropan Union, por subteni la atingon de federa sistemo, ni agas kunlabore kun EEU kaj samcele kun UFE (Unuiĝo de Federistoj Eŭropaj), reprezentata de Johano-Karlo Rinaldo. AVE havas ĉ. 350 membroj kaj abonantoj de la bulteneto AVENO. Nia retejo kolektas la plej gravajn dokumentojn kaj informojn, kaj krome AVE dissendas informojn per ret-mesaĝoj. Por membriĝi al AVE oni devus (sed ne devas) esti membro de iu Verda Partio; la membroj devas akcepti la "Verdan Filozofion" kaj la "Celojn" de AVE\*\*. Abono de AVENO eblas al ĉiuj. \*) AVE sukcesis amendi la Eŭropo-Programon (ĉapitro Kulturo kaj Edukado) de Buendnis 90 / Die Gruenen (la Verda Partio en Germanio) "... Kultura diverseco estas vivanta kaj oni ne rajtas redukti ĝin al nura folkloro au al la protekto de merkataj nomoj kiel Kamemberto, Fetao, Hallumio. La bazo kaj esprimo de la kultura diverseco estas la lingvoj de Eŭropo, ne sole la lingvoj de la plimulto-socioj, sed ankaŭ de la minoritatoj kaj krome Esperanto kiel internacia

lingvo de la interpopola komunikado. Plurlingveco estas forte subtenenda. ..."  
[www.gruene.de/fileadmin/user\\_upload/Dokumente/Europawahlprogramm/Europawahlprogram.pdf](http://www.gruene.de/fileadmin/user_upload/Dokumente/Europawahlprogramm/Europawahlprogram.pdf)

### Verda Filozofio de AVE:

- **Realigo de pensado kaj agado laŭ la principo, ke la vivo kaj ne (sole) la homo devas esti la centra kaj pivota punkto de ĉiu evoluo sur tiu ĉi planedo.**
- **Esperanto kiel internacia komunikilo per siaj ecoj "lingva neŭtraleco" kaj "mondvasta aplikebla facileco" adekvatas al la ekologia principo "Eta estas Bela".**

Celoj de AVE:

- Uzado kaj plivastigado de Esperanto kiel internacia komunikilo ene de Verda Movado, movado bazita sur ekologiaj principoj.
- Peranta agado inter la Verda Movado kaj la Esperanto-Movado.
- Enkonduki en la UEA-statuton la amendon, kiu metas la "ekologiajn necesojn kaj bezonojn, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj" en la saman rangon kiel la nociojn de paco kaj de la Homaj Rajtoj kaj deklaras ilin bazo de la UEA-laboro.

**Asocio de Verduloj Esperantistaj**  
**Manfred Westermayer**

### Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 8-an de junio 2009.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Manfred Westermayer, Peter Zilvar, Zsófia Kóródy, Seán Ó Riain, Eŭgeno Mackon kaj Fabien Tschudy, Renato Corsetti, Kaisa Hansen kaj Vesna Obradović

Kontakto: [vesna.obradovic@gmail.com](mailto:vesna.obradovic@gmail.com)

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, [www.eŭropo.eŭ](http://www.eŭropo.eŭ)



**Kun-financata de Eŭropa Unio kadre de la programo "Eŭropo por Civitanoj"2007 – 2013.**



# Eŭropa Bulteno

Majo-junio 2009, № 5-6 (82-83)

## 8-A KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO EN ESPERANTO-URBO

La 8-a kongreso de EEU okazis samtempe kaj samurbe kun la 86-a kongreso de germanaj esperantistoj de la 28-a de majo ĝis la 2-a de junio 2009 en Herzberg am Harz, Esperanto-urbo (Germanio). Partoprenis pli ol 400 personoj se oni kalkulas ankaŭ kelkajn junularajn grupojn kaj ensemblojn kiuj venis organizite por partopreni en kultura programo (el Hungario, Pollando kaj Germanio), sed estis ĉirkaŭ 300 veraj kongresanoj el dudeko da landoj eĉ el kelkaj ekstereŭropaj. La kongreso havis kelkajn aspektojn relative nekutimajn. Unue pro tio ke temis pri la plej granda esperantista aranĝo en Esperanto-Urbo entute ĝis nun, necesis iom da agado por la urbanoj. Tion oni aranĝis diversmaniere sed la plej grava estis dimanĉa evento kiam en la tradicia urba parado pentekoste partoprenis preskaŭ la tuta kongresanaro portante diversajn insignojn (verdajn ombrelojn, E-flagojn kaj ankaŭ po unu nacia flago de landoj partoprenintaj. La tuta urbanaro aŭ partoprenis aŭ salutis la paradon. Alia specifo estis ke estis eĉ tro da kulturaj programoj. La malferma ceremonio daŭris 4 horojn kun prezento de pluraj ensembloj, parolantoj kaj kantistoj.



kaj kantistoj. Inter la plej bonaj kulturaĵoj certe estis pupteatra spektaklo de profesia pupisto Christoph Frank, kiu ludis Baronon Muenchhausen-on en bona Esperanto. La spektaklo estis lerta, profesia kun tre bona animado de po 3 pupoj samtempe kaj tre bona voĉanimado. Mi ĝuis post multaj jaroj denove unu bonan pupteatraĵon en Esperanto kaj proponos ĝin al PIF en Zagrebo. Inter multaj prelegoj mi ĉeestis kaj estis pro tio tre kontenta la prelegojn de d-ro Zbignew Galor pri naciaj stereotipoj, de Petro Balaž pri E@I kaj de Yves Nevelsten pri Vikipedio. Mi mem prelegis pri Strategio por Esperanto en Eŭropa Unio

kaj Sean pri la politika evoluo en Germanio aparte post la falo de la Berlina muro kaj pri rilatoj al Esperanto.

La labora flanko de la kongreso estis ankaŭ kontentiga. Okazis ĉiuj planitaj aranĝoj. Unue kunsidis la estraro de EEU, kiu decidis pri transdono de la honora membreco de EEU por la jaro 2009 al urbestro de Herzberg, sinjoro Gerhard Walter pro lia granda merito konvinki la urban konsilantaron proklami la urbon Esperanto-urbo, la unua tia en la mondo. Poste la estraro traktis du kandidatojn por la sekva kongreso de EEU en 2011 kaj akceptis la inviton de la urbo Galway en Irlando. Ni lasis la decidon pri konkretaj datoj al la organizantoj post kiam ili eventuale interkonsentos kun Brita E-Asocio por eventuale samtempe organizi samloke ankaŭ la britan E-kongreson.



Poste ni havis malferman asemblean kunvenon en kiu ĉeestis ĉirkaŭ 30 personoj kaj en kiu ni prezentis nian raporton pri aktivecoj en 2008 kaj diskutis pri diversaj ideoj por la estonto.

Dimanĉon okazis la oficiala kunsido de la asembleo kun partoprenanto de delegitoj el 15 landoj. Ĝi akceptis la raportojn pri 2008 kaj la laborplanon por 2009. Oni diskutis ankaŭ pri partopreno en germanfranca kongreso en Kaiserslautern en 2010 kaj pri okazigo de la asemblea kunsido tie.

Aparte okazis kunveno inter la estraro de EEU kaj la

Hamburga E-societo pri okazigo de aparta eŭropa konferenco en 2011 por kiu EEU kaj HES kune starigos peton pri financado al Eŭropa Unio.

Oni tuŝis ankaŭ neceson kunlabori kun diversaj organizoj kaj eĉ politikaj partioj kiuj havas en sia programo lingvan demandon kaj aparte salutis la partion EDE kiu kandidatiĝis por la balotoj por la Eŭropa Parlamento en Francio kaj Germanio. Ni kun ĝojo informiĝis ankaŭ pri tio ke la ŝanco ke Margareta Handzlik denove sukcesi pri la membreco en Eŭropa Parlamento estas praktike 99%. La plano de EEU por 2009 antaŭvidas reteni profesian postenon en minimuma formo por povi efektiviĝi novajn petojn, planojn kaj projektojn, plu zorgi pri iniciatoj en Eŭropa Parlamento, partopreni en prilingvaj aranĝoj de Eŭropaj instancoj, eldoni Eŭropan Bultenon, prepari novajn projektojn rilate konkursojn de EACEA kaj pliintensigi la kunlaboron kun la landaj asocioj. Tiucele la asembleo starigis komisionon pri landaj asocioj konsistanta el 6 personoj kiuj zorgos ĉiu aparte pri kelkaj landoj de sia regiono. La precizajn nomojn de la komisionoj ni konfirmos post la kontaktado kun la proponitoj.



**Zlatko Tišljar**

## LA KOMUNA KONGRESO DE GEA KAJ EEU EN HERZBERG

La komuna kongreso de GEA kaj EEU en Herzberg - la Esperanto-urbo finiĝis antaŭ unu monato kun bonaj rezultoj, postsekvoj. Krom pluraj tujaj amasmediaj informoj (multaj gazetartikoloj, radio-raportoj, intervjuoj), nun ankaŭ en la E-aj gazetoj aperadas fotoj kaj informoj. Sur la titolpaĝoj de 'Esperanto-aktuell' kaj 'REVUO ESPERANTO' oni povas vidi fotojn dum la parado (procesio) tra la nova Esperanto-urbo Herzberg (dank' al Alfred Schubert kaj Stano Marcek). Estis bone, ke la Esperanto-movado iom forlasis sian kutime fermitan kongresejon. Multaj homoj en Herzberg vidis amason da esperantlingvaj parolantoj, bonan varbefikon havis la kunportitaj naciaj kaj verdaj E- flagoj, same la okulfrapaj varbombreloj kun la blankaj literoj ESPERANTO (dankon al la E-grupo "Unterweser").

La raportojn, bildojn ni kolektas sur la kongresa hejmpaĝo, bv. viziti:  
<http://gek-EEK.esperanto-urbo.de/page.php?pid=61051313>

Se vi estis partoprenanto, memoru la kongresajn eventojn, se ne, vidu, kion vi maltrafis!  
 Jen resumaj raportoj el la vidpunktoj de:

### 1. Prelegoj, fakaj temoj dum GEK/EEK

- Prelego pri Kubo, Juan Besada
- Prezento pri Kuba historio: Juan Besada
- Lumbildoj pri Esperanto-rondvojaĝo tra Azio: Mireille Grosjean
- Jim la migrulo: Libroprezento far prof-ro Rüdiger Sachs kaj informoj pri Serengeti-nacioparko
- Pri la gazeto Juna amiko : Stefan MacGill
- Naciaj stereotipoj kaj eŭropa identeco Zbygniew Galor
- Esperanto kiel mapilo inter du kulturoj kadre de trilingva temovortaro: D-ino Ilona Koutny
- Aktivecoj de Germana Esperanto-Junularo: Julia Hell
- Prelegoj: 20 jaroj post la murfalo En la jaro 1989 falis la muro inter oriento kaj okcidento.
- Festprelego: D-ro Sean O'Riain
- Strategio de EEU en poresperanta agado en Eŭropa Unio: Zlatko Tišljar
- Informoj pri AIS, D-ino Verá Barandovská-Frank
- La vojo al la unuiĝo de la du Germanaj Esperanto-Asocioj en la 90aj jaroj: d-ro Rudolf Fischer
- Personaj spertoj el nia iama limoregiono: Peter Zilvar
- Ĉu interkompreniĝo eblas malgraŭ miskomprenoj inter okcidentanoj kaj orientanoj? Elisabeth Schwarzer
- Kiel ŝanĝiĝis la percepto pri orienta Eŭropo ĉe la esperantlingvaj okcidentanoj? Giorgio Silfer
- Ekstermovada aplikado de Esperanto: Zdzislaw Glajcar
- Kaiserslautern la venontjara kongresurbo sin prezentas
- Purakore: poemaro de hungara poeto Attila József: Imre Szabó
- Nova universitata Esperanto trejnado en Szeged, Hungario: dr. Újvári Edit
- Lernu.net: Peter Balaž



- Seminario pri E@I: Peter Balaž
- Trejnseminario pri Vikipedio: Yves Nevelsteen
- Komputeko: Yves Nevelsteen
- Retvortaro: pastro Albrecht Kronenberger
- Prelego pri filmado: Sebastian Kirf
- Eŭro en Ĉeĥio & ĉeĥa prezidentaĵo en EU
- Prelego pri libro Esperanto per rekta metodo : Stano Marcek
- Informoj pri la saniga efiko de ginsengo: Harald Schicke
- Vojaĝoj al ambaŭ koreaj landoj: Harald Schicke
- Fakprelego pri biero kun biergustumado: Harald Schicke
- Verduloj & Esperanto / Verda Ekonomio: Dr. Manfred Westermayer
- Homeopatio (mirakla sanigo): Kees Ruig
- Informoj pri GEK/EEK 2009 & Esperanto-urbo kaj EEU: Peter Zilvar, Zsófia Kóródy
- Komuna elkonstruo de Herzberg la Esperanto-urbo. Forumo kun diskutado
- Privilegia vojo: Persistema klerigado far GEA-filio en Herzberg (kiel akiri valorajn fakdiplomojn de GEA), Peter Zilvar, Zsófia Kóródy
- Nova ĉeĥa Esperanto-muzeo: d-ro Petro Chrdle
- Ekonomia Esperanto: Hans Welling
- Ĝenerala kono de Esperanto en Francio: Cyrille Hurstel
- Ekspozicio pri Esperanto-filatelio kaj raraj E-kolektobjektoj (absoluta pinto, eksterordinara evento), Stany Rynduch
- Esperanto-ekspozicio en la kavalira salono de la Kastelo (Kun speciala Esperanto-kolektaĵo de filatelisto Kurt Zietz el Herzberg)



## 2. Kunsidoj

EEU-kunsido, EEU-sembleo

- Jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio (GEA)
- GEA: Landaj Ligoj (LALI): diskuto pri la estonto de la germana Esperanto-movado
- Jarĉefkunveno de E. Landa-Ligo en Malsupra Saksio (EMAS) Thomas Heberlein
- Kunsido de Landa Ligo REVELO
- Kunsido de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI): Zsófia Kóródy
- ILERA + AREF (Esperanto-Kolektanoj kaj Filatelistoj)

## 3. Ekskursoj

- Ekskurso per aŭtoj al Unukornulo-Groto (Einhornhöhle) en Scharzfeld
- Gvidado tra la Esperanto-urbo kun vizito de la kastela muzeo kaj de la speciala Esperanto-ekspozicio
- Gvidata promenado sur la rondvojo Akvo-8
- Matenaj kur-horoj kun Henryk Wenzel
- Busekskurso tra la Harz-montaro al Goslar, urbo de mondkulturheredaĵo





- Busekskurso al la Eŭropa Rozario en Sangerhausen, poste vizito al la grandega Kyffhäuser-Monumento
- Komuna trajnekskurso al Braunschweig kun gvidado, vizito de muzeoj kaj historia malnovurbo

Kromaj rekomendoj estis:

komunaj ekskursoj, ekz. al la Rhume-fonto kaj al la historia urbo Duderstadt (20 km) aŭ Göttingen (35 km). Migrado sur la proksima monto Knollen, al Hanskühnenburg ĉe Lonau.

#### 4. Kulturaj kaj distraj programofertoj

- Boule-ludado ĉe la Boule-ludejo apud Jues-lago
- Interkona vespero sub gvidado de kantisto Ralph Glomp
- Grekaj kantoj de German-Greka Koruso el Herzberg
- La internacia Esperanto-Koruso, (projekto Vielfalt tut gut - Bunteco bonas) sub gvido de Otto Kern
- Muzikgrupoj de la gimnazio (lerneja koruso: Christian Gödeke; instrumenta grupo: Gitta Ammer)
- RYTMIX Infana Dancensemblo el Toruno
- SZENÁ-TOROK La hungara parlamenta koruso
- Georgo Handzlik la Esperanto-bardo kantas
- Speciala junulara muzikprogramo en la urba junulardomo kun la diskĵokeoj Erik & Leo, junularprogramo sub gvidado de Julia Hell, GEJ-prezidantino



- Filatelista evento, aparta poŝtstampo pro la E-kongreso
- Ekspozicio pri Esperanto-filatelo en la urba biblioteko
- Ekumena Diservo, pastro Albrecht Kronenberger kaj pastoro Peter Bäß, Sankta Jozefo-Kirko
- Bunta kulturvespero -Ulrich Mattke Pianoludado, Alfons Hoffmann Kantado, Harzklub Pöhlde prezentas sin, Ralph Glomp, fama E-kantisto el Hamburgo, Klezmorim Sennomaj sub gvido de Peter Bäß el Berlin
- Komuna kantado de Internacia Esperanto-Koruso kun ĉ. 100 infanoj kaj plenkreskuloj sur bazara placo apud la urbodomo, (projekto Vielfalt tut gut - Bunteco bonas) sub gvido de Otto Kern
- Partopreno ĉe la urba festparado, kun kostumoj, flagoj, varbombreloj
- Teatra vespero: Münchhausen la vera kazo. Teatra spektaklo, Christoph Frank
- Aŭkcio de libroj kaj brokantaĵoj je favoro de Esperanto-urbo
- Bunta adiaŭa vespero (gvidis Stany Rynduch), Dancprezentado de la premiita grupo Baby Jagi el Toruno, Georgo Handzlik la Esperanto-bardo, unuopuloj kaj grupoj
- Adiaŭa piroteknikaĵo

**Peter Zilvar, Zsófia Kóródy**

## SVEDA ESPERANTO-KONGRESO

La Sveda Esperanto-kongreso estas kunlaboro inter esperantoorganizoj en Svedio. La kongreso okazis 22-24-an de majo 2009 en popolaltlernejo de Fornby en Borlänge, Dalekarlajo. Ĉirkaŭ 60 personoj ĉeestis kaj okazis dum tiuj tagoj samloke ankaŭ kunvenojn de svedaj esperanto organizoj.

- SEF, Sveda Esperanto-Federacio , havis sian jarkunvenon
- SEJU, Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo, havis sian Anemona renkontiĝo
- ELDONA, Eldona Societo Esperanto - havis sian jarkunvenon
- E-G, Esperanto-Gården (E-G), havis malfruan jarkunvenon
- ILEI-se, Sveda sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, havis ne jarkunveno sed membrokunveno
- SEI, Sveda Esperanto-Instituto (SEI), havis sian jarkunvenon kaj aranĝis plankunveno kun gruplaboroj
- KELI, Sveda sekcio de KELI, havis sian jarkunvenon



Inter tre interesaj programeroj estis prelegoj:

- Projekto Lingvolanĉilo (angle "Springboard to Languages") de sinjoro Paŭlo Gubbins el Britujo. Tiu prelego estas vere imitinda kaj ripetinda multloke en aliaj landoj!
- Ĝardena fervojkonstrua projekto de sinjoro Paŭlo Gubbins el Britujo. Amuza prezento pri ĝi, kun multaj bonaj fotoj, kelkaj surprizaj. Vidu pli ĉe Youtube: "Garden Railway - Roundhouse Lady Anne first run SM32 16mm"
- Lingvolernado en la interreto de sinjoro Konstantin Andreev el Rusio kaj Svedio. Prelego impona de ruso kiu loĝas de antaŭ unu kaj duona jaroj en Svedio kaj antaŭ nur du monatoj kaj dek tagoj komencis lerni esperanton. Ĉiujn aŭskultantojn imponis lian flue bonan lingvonivelon. La temo de la prelego estis grava; ĝi temis pri lingvolernado per interreto, en kiu altlernejo (universitato) de Faluno estas elstare sukcesa kaj havas studentojn en diversaj kontinentoj kaj eĉ atingis organizi por svedoj kurson pri la kopta (praegipta) lingvo. La evidentaj demandoj estis, kiel oni povas tian sukceson realigi ankaŭ por esperanto, kaj kiel eblas kupli tion al nia kara lernu.net.

Aliaj programeroj estis:

- Librotablo – prizorgis Karin kaj Thomas Tulkiewicz
- Kurso por komencantoj – prizorgis Roland Lindblom
- Distraĵo, komuna kantado, komuna dancado, folkloro muziko – prizorgis Mhedí Martin Strid

La impreson estis ke la partoprenantoj kontentis pri la kongreso kaj ŝatis ĝian etoson.

**Kaisa Hansen**

## **ELEKTO DE LA EŬROPA PARLAMENTO (EP) 2009**

### **Mesaĝo de la Prezidanto de EEU**

La elektoj en la 27 EU-landoj komence de junio 2009 donas ege gravan okazon al la Esperanto-movado en Eŭropo: ŝancon rekte influi la lingvopolitikon de EU. Nepre necesas pligrandigi la nombron de subtenantoj de lingva justeco, kaj do de simpatiantoj pri ia rolo por Esperanto, inter la eŭrodeputitoj. En la nuna EP EEU honorigis la du deputitojn kiuj plej multe subtenis niajn ideojn, kaj ni esperas ke ili ambaŭ reelektiĝos: Margareta Handzlik el Pollando kaj Ljudmila Novak el Slovenio.

Ekde la lasta EP-elekto en junio 2004 okazis afero kiu jam tre gravis en si mem, sed kiu eĉ pligraviĝis pro la nuna profunda internacia ekonomika krizo: la publikigo de la Raporto Grin.

Tiu raporto, kiun verkis profesoro François Grin de la Universitato de Ĝenevo fine de 2005, montris du interesajn aferojn:

1. EU perdas €25 miliardojn jare pro la rifuzo doni rolon al Esperanto.
2. La nuna internacia dominado de la angla lingvo faras financajn transferojn de €17-18 miliardojn jare al Britio.

Tre gravas ke la landaj asocioj de UEA skribu petante reagon pri tiuj du faktoj de kandidatoj en la EP-elektoj. La unua fakto koncernas ĉiujn 27 EU-landojn, la dua estas pli taŭga por kampanjo en la 25 ne-anglalingvaj landoj. Baze de tiuj du faktoj, oni povas facile prepari demandojn al deputitoj kaj estontaj deputatoj, ekzemple:

Tra la tuta EU: “Ĉu vi, malgraŭ la nuna financa kaj ekonomia krizo, konsentas ke EU daŭrigu la perdadon de €25 miliardoj jare? Kion fakte donas al ni tiu ege multekosta antaŭjuĝo kontraŭ Esperanto? Ĉu vi akceptas, aŭ malakceptas, la koncepton de lingva justeco, t.e. ke ĉiu civitano havas egalan valoron, sendepende de sia denaska lingvo?”

En la 25 ne-anglalingvaj EU-landoj: “Ĉu vi konsentas kun la nuna gajnado de €17 miliardoj jare fare de Britio kaj Irlando? Se jes, ĉu vi do akceptas ke germanoj/francoj/italoj/hispanoj/poloj, ktp dum la tuta vivo financu Brition? Ĉu viaj samlandanoj meritas vivolongan monpunon pri la krimo ke ili ne naskiĝis en Britio aŭ Irlando?”

Oni aldone menciui la brilan britan projekton, “Springboard”, kiu instruas limigitan kvanton de Esperanto cele al plibonigo de lingvolernado ĝenerale: tio efike nuligas la antaŭjuĝon ke Esperantistoj intencas forigi aliajn lingvojn. Dek tagoj antaŭ lia tragika morto en akcidento julie 2008, la lasta mesaĝo de Vicprezidanto de Eŭropa Parlamento Geremek al siaj 784 kolegoj estis invito al diskuto pri la temo “Esperanto: malamiko aŭ amiko de plurlingveco? Kaj kiam oni rilatas kun subtenantoj de eŭropa integriĝo, oni substreku la potencialon de Esperanto plifortigi tuteŭropan identecon harmonie kun naciaj kaj regionaj identecoj. En la vortoj de Geremek: “Ni kreis Eŭropon: nun ni devas krei eŭropanojn.”

EEU rekomendas ke la landaj asocioj en EU-landoj kontaktu kandidatojn por la EP-elektoj kiom eble plej frue, kaj starigu al ili tiajn konkretajn demandojn, aŭ aliajn laŭ la specifaj kondiĉoj de la lando. Se ni volas esti efikaj, ni devus peti subtenon por la kandidatoj, sendepende de politika partio, kiuj subtenas lingvan justecon. Kaj ni devus ankaŭ diskonigi la respondojn kiujn ni ricevus, kaj la nomojn de kandidatoj kiuj ne respondas. La voĉdonantoj rajtas scii la sintenon de kandidatoj pri tiuj gravaj demandoj, kiuj havas tiom grandajn financajn sekvojn. Nia movado havas devon informiĝi pri tio, kaj informi la voĉdonantojn. Poste ili mem decidu!

**Seán Ó Riain**

## **EDE SUR LA FLANKO DE LA KRESKANTAJ PARTIOJ EN LA EU**

La franca kaj germana EDE (Eŭropo Demokratio Esperanto) estas je la flanko de la gajnintaj partioj ĉe la Eŭropaj Balotoj.

Sed ne en la sama direkto kiel la plejmultaj, precipe nacie konservativaj, ofte eĉ dekstre radikalaj partioj. EDE kreskis (se ankaŭ nur minimume sed tamen) naĝante kontraŭ la nuntempe ĝenerala kontraŭeŭropa fluo, por Eŭropo.

EDE povis modeste kreski sur la flanko de la meza racio de la internacieco. Ankaŭ se tiu strebo estas kontraŭ la ĝenerala intenco nuntempe en la EU, ĝi tre gravas por la protekto kaj defendo de la demokratio ĝenerale por ne perdi la ŝancon rekonstrui nian oldan Eŭropon, per nova internacia demokratio.

En Francio la EDE akiris plus 4.0010 voĉojn, aŭ 0,02 % pli ol 2004.

En Germanio la EDE akiris plus 11.859, aŭ 0,045 % pli da voĉoj ol 2004, kiam ili ne povis partopreni la balotojn ĉar ne atingis la nombron de la necesaj subskriboj.

Ankaŭ se la EDE-anoj ĝenerale esperis ricevi pli da voĉoj, se oni analizas la cirkonstancojn en kiuj ili faris sian kampanjon kaj komparas iliajn eblojn kun la aliaj partioj, oni devas esti kontenta kun la atingita rezulto.

En Germanio ekzistas ekzemple nur 30 aktivaj EDE-anoj kaj ili elspezis por la balotoj ne plu ol 10.000 eŭroj. Por la komparo: CDU, la nun plej granda partio en Germanio, elspezis 1.000.000 eŭrojn por la eŭropaj balotoj. Malgranda alia kalkulo: Ĉe la EDE venas 400 voĉoj al unu membro. Por komparo; ĉe la verduloj 70 voĉoj/membro.

Bedaŭrinde eĉ grandaj demokratiaj partioj menciis apud la plejparte naciaj temoj nur rande tuteŭropajn problemojn kaj interesojn (ni ne forgesu ĉe Eŭropaj Balotoj). En la tuta Eŭropa Unio alparolis nur du kandidatoj la internacian demokration, la EDE kaj la Newropeans, tiuj ankaŭ nur en Francio kaj Germanio. Fakte jes, la plej grandaj kaj evoluantaj landoj en la EU, sed tamen ankaŭ eĉ tie montriĝis en la demokratia baloto la malalta ĝenerala nivelo de la internacia konscio de la civitanoj.

Pro tio, se ni en la estonto plu volas havi Eŭropan Union kaj ĝin surkonstrui al demokratie vivkapabla lando de la mondo, ni havos ankoraŭ multe da laboron. Ĉiuj tiuj, kiuj jam havas kelkajn internaciajn spertojn kaj atingis iun internacian konscion, tion pludoni kaj helpi al tiuj civitanoj kiuj ĝis nun ne havis la eblojn por tiuj spertoj. Oni povas diversmaniere komenci evolui tion konscion, la plej senpere alirebla estas por la plejmulte da civitanoj, demokratie, per Esperanto. Pro tio havas EDE en sia programo, kiel unu el la plej gravaj taskoj, per la politiko disvastigi Esperanton en la Eŭropa Unio.

### **Eŭgeno Macko**

#### **EDE en Alzaco**

Sekve al la balotado ni ricevas bonajn novaĵojn el Alzaco. Ekde septembro Esperanto estos enkondukita kiel studfako en la universitato de Mulhausen kiel volontula paroliga kurso por oficistoj de la Konsilode Eŭropo (Sidejo en Strasburgo) en la kadro de aktivaĵoj, kiujn la unuiĝo de la Eŭropkonsiliaj kunmembroj proponas al la lokaj oficistoj. Ankaŭ mi aŭdis, ke ne-malmultaj instruistoj de la Strasburga universitato ŝatus sin dediĉi por sekvi la instruadon de Esperanto.

Ĉi-tiu novaĵo estas des pli entuziasmiga, ĉar Strasburgo iel estas Eŭropa urbo (kun institucioj de Eŭropa Parlamento).

### **Fabien Tschudy**



## ANALIZO DE EU-KONSULTIĜOJ LAŬ TEMOJ

**Prenate en konsideron unuajn kvin temojn en 22 EU-landoj (mankas Latvio, Litovio, Grekio, Cipro kaj Malto) jen la ranglisto de temoj trovitaj:**

- |  |   |
|--|---|
| 1. Esperanto: konsideri Esperanton kiel lingva helpilo en EU : 22 landoj el kiuj en 16 je unua pozicio | 18. Nuligi koridojn (1)                               |
| 2. Leĝigo de marihuano (en 9 landoj el kio en 2 landoj 1-a pozicio)                                    | 19. Fari en EU zonan sen OGM (FR) (1)                 |
| 3. Starigo de agentejo por kontroli impostojn en 7 landoj (neniu unua pozicio)                         | 20. Permesi abortigon (1)                             |
| 4. Pli da okupiĝado kaj financado de ekologiaj temoj (en 6 landoj)                                     | 21. Pli zorgi pri homaj rajtoj (1)                    |
| 5. Solvi la financekonomian krizon (en 5 landoj)   | 22. Homaj rajtoj por nenaskitoj (1)                   |
| 6. Batalo kontraŭ malriĉeco (en 5 landoj)  | 23. Malpli da trafiko por purigi la aeron (1)         |
| 7. Fari pli por evoluigi volontulecon (en 3 landoj)  | 24. Eŭropa Parlamento sen »dondannati« (IT) (1)       |
| 8. Lerni pri Eŭropo en lernejoj (en 3 landoj)  | 25. Infana vilaĝo por eŭropaj civitanoj (1)           |
| 9. Rekoni rajtojn de bestoj (en 3 landoj)  | 26. Malpermesi »rook« (NL) (1)                        |
| 10. Batalo kontraŭ diskriminacio de virinoj (2)  | 27. Eŭro (PL) (1)                                     |
| 11. Pli da socialaj rajtoj (2)   | 28. Solvi energoproblemon pri gaso (1)                |
| 12. Forigi nukleajn elektrajn centralojn (2)   | 29. Eduki pri komuna eŭropa historio (1)              |
| 13. Fini subvencii agrikulturon (2)  | 30. Rreligio en lernejojn (1)                         |
| 14. Doni laboron al gejunuloj (1)  | 31. Salajroj egalaj kun EU (1)                        |
| 15. Garantii bazajn 4 liberojn (1)   | 32. Pli altaj pensioj (1)                             |
| 16. Lerni pri solidareco (1)   | 33. Batalo kontraŭ korupto (1)                        |
| 17. Batali kontraŭ genetike prilaboritaj nutraĵoj (1)  | 34. Defendo de konsumantaj rajtoj (1)                 |
|  | 35. Uzi liberan softvaron en administrado (1)         |
|  | 36. Sankcii monopolon en telekomunikado (1)           |
|  | 37. Medicino patentoj ? (Sv) (1)                      |
|  | 38. Starigi profesion el edukado de infanoj hejme (1) |
|  | 39. Fortigi demokration (1)                           |
|  | 40. Haltigi ŝtatan burokrativastiĝon (1)              |

Mi ne analizis 5 landojn ĉefe pro tio ke iliajn lingvojn mi neniel povis deĉifri.

Restis 11 temoj en la menciitaj 22 landoj kiujn mi ne komprenis (verŝajne ili ne grave ŝanĝus la rangordon).

Evidentos por EU ke por Esperanto okazis organizita kampanjo (speciale en Hungario kie unuajn 4 poziciojn okupis 4 diversaj proponoj pri Esperanto), sed ĝi devus signali al la EU-ĉefuloj ke Esperantistoj estas grava forto, ĉar ili kapablas engaĝi tiom da interesitoj por sia afero.

Evidentos ankaŭ ke kampanjon organizis iu grupo kiu en 7 landoj voĉdonigis kvardekon da homoj por sia propono pri starigo de Eŭropa Agentejo por kontroli impostojn – kio montras efektive kiel febla estas tia maniero esplori la publikan opinion, se nur 40 homoj povas esence influi la statistikon. Eĉ la fakto ke en Francio voĉdonis preskaŭ 800 homoj por Esperanto, dum la unua propono ricevis iom pli ol 3000 kaj sekve Esperanto gajnis 25% da voĉoj kompare kun la plej forta propono – montras ke pri tiaspecaj enketoj interesiĝas tre malmultaj civitanoj. Entute

laŭ mi en la voĉdonado partoprenis ĉirkaŭ 100.000 homoj kio estas 0,5 promiloj aŭ 0,05 % de la eŭropa loĝantaro.

Se ni sumas la tutan voĉdonantaron por ĉiuj Esperanto-proponoj en la 22 landoj ni ricevas 5262 voĉojn kio estas en la tuta sumo de voĉoj 5%. Se ni ricevus 5% da voĉoj en balotoj, nia partio rajtus eniri la parlamenton! Inter tiuj voĉoj estas ĉirkaŭ 100 personoj kiuj voĉdonis solidarece en preskaŭ ĉiuj listoj. El tiu kaj similaj voĉdonadoj en aliaj poresperantaj proponoj en kiuj simile kelkmil esperantistoj voĉdonis, mi povas konkludi ke ekzistas ĉirkaŭ 3-4000 esperantistoj en interreto kiuj aktive sekvas la okazadojn kaj kunlaboras en la interreto. Tion konfirmas ankaŭ la blogaro ipernity en kiu membras plej granda kvanto da esperantistoj kun ĉirkaŭ 3000 membroj kaj ankaŭ la fakto ke ekzistas ĉirkaŭ 300 diversaj elektronikaj listoj en kiuj membras de kelkdeko ĝis kelkcento da membroj.

Mirindaĵo estas unuaj pozicioj por Esperanto en grandegaj landoj kia Germanio, Italio kaj Britio. Tio montras antaŭ ĉio katastrofe malaltan intereson de tiuj popoloj por Eŭropa Unio kaj aktiva civitaneco.

**Zlatko Tišljar**

## ESPERANTO EN LA BIBLIOTEKOJN EN ITALIO



Itala Esperanto-Federacio jam de longa tempo zorgas pri kontaktoj kun italaj bibliotekoj kaj kelkaj el ili regule ricevas la italan Esperanto-revuon.

En la pasinta jaro la Nacia Konsilantaro de IEF lanĉis kampanjon por donaci librojn pri Esperanto al bibliotekaj pretaj akcepti ilin. La kampanjon kunordigis la nacia konsilanto Ermigi Rodari, kiu pere de lokaj esperantistoj enketis pri la emo de la bibliotekoj ricevi librojn pri Esperanto kaj meti ilin en la bibliotekan katalogon. La sukceso estis rimarkinda.

109 bibliotekoj akceptis niajn librojn kaj la direktoroj de kelkaj el ili eĉ dankis skribe.

Oni donacis 86 lernolibrojn de Migliorini, 107 vortarojn Corsetti-Vessella, 106 ekzemplerojn de la

verko de Janton en la itala, "Esperanto: lingua, letteratura, movimento" kaj ankaŭ kelkaj aliaj verkoj al bibliotekoj, kiuj jam posedis unu el la unue cititaj verkoj.

Kompreneble oni ankaŭ donacis abonojn al la itala Esperanto-revuo por la bibliotekoj, kiuj petis tion.

La pozitiva sperto instigas al aliaj similaj agadoj. Gravega estas la rolo kaj de la kunordiganto kaj de la lokaj esperantistoj, kiuj plenumas la esencajn lokajn kontaktojn.

**Renato Corsetti**

## AVE - 25 JAROJ DA KUNLABORO KUN LA VERDAJ PARTIOJ TUTMONDE



AVE estis fondita en Marto de 1984 en Lishge (Belgio) okaze de la unua renkontiĝo de la Eŭropaj Verdaj Partioj. El la fondintoj: Maire Mullarney (1922 - 2008, la koro de AVE, kunfondinto de la irlanda Verda Partio), Christopher Fettes (unua redaktoro de AVE-NOvaĵoj, AVENO), Jean-Claude Thumerelle (unua sekretario), Wolfgang Guenther, Ute Haas, Emilo Mas kaj Claude Rouget (kiu eldonis VERDire). AVE-anoj kunvenas enkadre de la kongresoj de la Eŭropaj kaj Tutmondaj Verdaj Partioj. Bonkvalita interpretado de la ĉefaj prelegoj i.a. en Esperanton okazis 1991 je la unua Eŭropa Kongreso de la Verdaj Partioj en Zuriko fare de Claude Gacon kaj Claude Piron, kion ebligis niaj geamikoj el Francio kaj la svisa Verdulo Hans Beat Schaffner. Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne estas tiom multaj por postuli tion regule. AVE k.a. almenaŭ sukcesis ke la Eŭropaj Verduloj akceptis kelkajn rezoluciojn favore al la uzado

de Esperanto en la Eŭropa Unio. La franca (1999) kaj la germana (2009\*) Verda Partio enmetis Esperanton en siajn Eŭropo-Programojn. Aliflanke AVE tradukas gravajn dokumentojn de la Verdaj Partioj, inkluzive de iliaj Eŭropa kaj Tutmonda Organizaĵoj, kaj tiel ankriĝas per ret-ligoj en iliaj retejoj. Je la kongreso en Zuriko Manfred Westermayer transprenis la AVE-sekretarion. Dum la AVE-kunsido 2003 en Gotenburgo, okaze de la 88a UK, majoritato konfirmis la neformalan statuson de AVE, kio poste estis konfirmita per voĉdono inter la membroj. Tiel ni evitas burokratajn aferojn. Pere de la tradukado de gravaj Verdulaj dokumentoj ni informas la samideanojn pri la Verda Alternativo cele al daŭrigebla estonteco, kaj aliflanke ni montras al la Verduloj ke Esperanto kun siaj neŭtraleca lingvo kaj malpeza sed bonkvalita strukturo optimale agordas al la Verda ideologio de paca kunvivado kaj ekologia daŭropoveco. Kompreneble AVE kunlaboras ankaŭ kun diversaj Esperanto-Organizaĵoj kiel UEA, SAT kaj EEU; kaj regule AVE kontribuas pere de kunsidoj kaj prelegoj enkadre de iliaj kongresoj, ekz-e en Maribor (EEU 2007) pri la temo "Akvo kaj plastajoj". i ankaŭ kunvenis enkadre de ekologiaj okazaĵoj kiel "Ekologio kaj Turismo" (Riga) kaj kunvenos 2009-08-22 okaze de "Ekotur" (Svitavy, org-o: P. Chrdle). Rilate Eŭropan Union, por subteni la atingon de federa sistemo, ni agas kunlabore kun EEU kaj samcele kun UFE (Unuiĝo de Federistoj Eŭropaj), reprezentata de Johano-Karlo Rinaldo. AVE havas ĉ. 350 membroj kaj abonantoj de la bulteneto AVENO. Nia retejo kolektas la plej gravajn dokumentojn kaj informojn, kaj krome AVE dissendas informojn per ret-mesaĝoj. Por membriĝi al AVE oni devus (sed ne devas) esti membro de iu Verda Partio; la membroj devas akcepti la "Verdan Filozofion" kaj la "Celojn" de AVE\*\*. Abono de AVENO eblas al ĉiuj. \*) AVE sukcesis amendi la Eŭropo-Programon (ĉapitro Kulturo kaj Edukado) de Buendnis 90 / Die Gruenen (la Verda Partio en Germanio) "... Kultura diverseco estas vivanta kaj oni ne rajtas redukti ĝin al nura folkloro au al la protekto de merkataj nomoj kiel Kamemberto, Fetao, Hallumio. La bazo kaj esprimo de la kultura diverseco estas la lingvoj de Eŭropo, ne sole la lingvoj de la plimulto-socioj, sed ankaŭ de la minoritatoj kaj krome Esperanto kiel internacia

lingvo de la interpopola komunikado. Plurlingveco estas forte subtenenda. ..."  
[www.gruene.de/fileadmin/user\\_upload/Dokumente/Europawahlprogramm/Europawahlprogram.pdf](http://www.gruene.de/fileadmin/user_upload/Dokumente/Europawahlprogramm/Europawahlprogram.pdf)

### Verda Filozofio de AVE:

- **Realigo de pensado kaj agado laŭ la principo, ke la vivo kaj ne (sole) la homo devas esti la centra kaj pivota punkto de ĉiu evoluo sur tiu ĉi planedo.**
- **Esperanto kiel internacia komunikilo per siaj ecoj "lingva neŭtraleco" kaj "mondvasta aplikebla facileco" adekvatas al la ekologia principo "Eta estas Bela".**

Celoj de AVE:

- Uzado kaj plivastigado de Esperanto kiel internacia komunikilo ene de Verda Movado, movado bazita sur ekologiaj principoj.
- Peranta agado inter la Verda Movado kaj la Esperanto-Movado.
- Enkonduki en la UEA-statuton la amendon, kiu metas la "ekologiajn necesojn kaj bezonojn, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj" en la saman rangon kiel la nociojn de paco kaj de la Homaj Rajtoj kaj deklaras ilin bazo de la UEA-laboro.

**Asocio de Verduloj Esperantistaj**  
**Manfred Westermayer**

### Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 8-an de julio 2009.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Manfred Westermayer, Peter Zilvar, Zsófia Kóródy, Seán Ó Riain, Eŭgeno Mackon kaj Fabien Tschudy, Renato Corsetti, Kaisa Hansen kaj Vesna Obradović

Kontakto: [vesna.obradovic@gmail.com](mailto:vesna.obradovic@gmail.com)

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, [www.eŭropo.eŭ](http://www.eŭropo.eŭ)



**Kun-financata de Eŭropa Unio kadre de la programo "Eŭropo por Civitanoj"2007 – 2013.**



# Eŭropa Bulteno

Majo - junio 2009, № 5-6 (82-83)

## 8-A KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO EN ESPERANTO-URBO

La 8-a kongreso de EEU okazis samtempe kaj samurbe kun la 86-a kongreso de germanaj esperantistoj de la 28-a de majo ĝis la 2-a de junio 2009 en Herzberg am Harz, Esperanto-urbo (Germanio). Partoprenis pli ol 400 personoj se oni kalkulas ankaŭ kelkajn junularajn grupojn kaj ensemblojn kiuj venis organizite por partopreni en kultura programo (el Hungario, Pollando kaj Germanio), sed estis ĉirkaŭ 300 veraj kongresanoj el dudeko da landoj eĉ el kelkaj ekstereŭropaj. La kongreso havis kelkajn aspektojn relative nekutimajn. Unue pro tio ke temis pri la plej granda esperantista aranĝo en Esperanto-Urbo entute ĝis nun, necesis iom da agado por la urbanoj. Tion oni aranĝis diversmaniere sed la plej grava estis dimanĉa evento kiam en la tradicia urba parado pentekoste partoprenis preskaŭ la tuta kongresanaro portante diversajn insignojn (verdajn ombrelojn, E-flagojn kaj ankaŭ po unu nacia flago de landoj partoprenintaj. La tuta urbanaro aŭ partoprenis aŭ salutis la paradon. Alia specifo estis ke estis eĉ tro da kulturaj programoj. La malferma ceremonio daŭris 4 horojn kun prezento de pluraj ensembloj, parolantoj kaj kantistoj.



kaj kantistoj. Inter la plej bonaj kulturaĵoj certe estis pupteatra spektaklo de profesia pupisto Christoph Frank, kiu ludis Baronon Muenchhausen-on en bona Esperanto. La spektaklo estis lerta, profesia kun tre bona animado de po 3 pupoj samtempe kaj tre bona voĉanimado. Mi ĝuis post multaj jaroj denove unu bonan pupteatraĵon en Esperanto kaj proponos ĝin al PIF en Zagrebo. Inter multaj prelegoj mi ĉeestis kaj estis pro tio tre kontenta la prelegojn de d-ro Zbignew Galor pri naciaj stereotipoj, de Petro Balaž pri E@I kaj de Yves Nevelsten pri Vikipedio. Mi mem prelegis pri Strategio por Esperanto en Eŭropa Unio

kaj Sean pri la politika evoluo en Germanio aparte post la falo de la Berlina muro kaj pri rilatoj al Esperanto.

La labora flanko de la kongreso estis ankaŭ kontentiga. Okazis ĉiuj planitaj aranĝoj. Unue kunsidis la estraro de EEU, kiu decidis pri transdono de la honora membreco de EEU por la jaro 2009 al urbestro de Herzberg, sinjoro Gerhard Walter pro lia granda merito konvinki la urban konsilantaron proklami la urbon Esperanto-urbo, la unua tia en la mondo. Poste la estraro traktis du kandidatojn por la sekva kongreso de EEU en 2011 kaj akceptis la inviton de la urbo Galway en Irlando. Ni lasis la decidon pri konkretaj datoj al la organizantoj post kiam ili eventuale interkonsentos kun Brita E-Asocio por eventuale samtempe organizi samloke ankaŭ la britan E-kongreson.



Poste ni havis malferman asemblean kunvenon en kiu ĉeestis ĉirkaŭ 30 personoj kaj en kiu ni prezentis nian raporton pri aktivecoj en 2008 kaj diskutis pri diversaj ideoj por la estonto.

Dimanĉon okazis la oficiala kunsido de la asembleo kun partoprenanto de delegitoj el 15 landoj. Ĝi akceptis la raportojn pri 2008 kaj la laborplanon por 2009. Oni diskutis ankaŭ pri partopreno en germanfranca kongreso en Kaiserslautern en 2010 kaj pri okazigo de la asemblea kunsido tie.

Aparte okazis kunveno inter la estraro de EEU kaj la

Hamburga E-societo pri okazigo de aparta eŭropa konferenco en 2011 por kiu EEU kaj HES kune starigos peton pri financado al Eŭropa Unio.

Oni tuŝis ankaŭ neceson kunlabori kun diversaj organizoj kaj eĉ politikaj partioj kiuj havas en sia programo lingvan demandon kaj aparte salutis la partion EDE kiu kandidatiĝis por la balotoj por la Eŭropa Parlamento en Francio kaj Germanio. Ni kun ĝojo informiĝis ankaŭ pri tio ke la ŝanco ke Margareta Handzlik denove sukcesi pri la membreco en Eŭropa Parlamento estas praktike 99%. La plano de EEU por 2009 antaŭvidas reteni profesian postenon en minimuma formo por povi efektiviĝi novajn petojn, planojn kaj projektojn, plu zorgi pri iniciatoj en Eŭropa Parlamento, partopreni en prilingvaj aranĝoj de Eŭropaj instancoj, eldoni Eŭropan Bultenon, prepari novajn projektojn rilate konkursojn de EACEA kaj pliintensigi la kunlaboron kun la landaj asocioj. Tiucele la asembleo starigis komisionon pri landaj asocioj konsistanta el 6 personoj kiuj zorgos ĉiu aparte pri kelkaj landoj de sia regiono. La precizajn nomojn de la komisionoj ni konfirmos post la kontaktado kun la proponitoj.



**Zlatko Tišljar**

## LA KOMUNA KONGRESO DE GEA KAJ EEU EN HERZBERG

La komuna kongreso de GEA kaj EEU en Herzberg - la Esperanto-urbo finiĝis antaŭ unu monato kun bonaj rezultoj, postsekvoj. Krom pluraj tujaj amasmediaj informoj (multaj gazetartikoloj, radio-raportoj, intervjuoj), nun ankaŭ en la E-aj gazetoj aperadas fotoj kaj informoj. Sur la titolpaĝoj de 'Esperanto-aktuell' kaj 'REVUO ESPERANTO' oni povas vidi fotojn dum la parado (procesio) tra la nova Esperanto-urbo Herzberg (dank' al Alfred Schubert kaj Stano Marcek). Estis bone, ke la Esperanto-movado iom forlasis sian kutime fermitan kongresejon. Multaj homoj en Herzberg vidis amason da esperantlingvaj parolantoj, bonan varbefikon havis la kunportitaj naciaj kaj verdaj E- flagoj, same la okulfrapaj varbombreloj kun la blankaj literoj ESPERANTO (dankon al la E-grupo "Unterweser").

La raportojn, bildojn ni kolektas sur la kongresa hejmpaĝo, bv. viziti:  
<http://gek-EEK.esperanto-urbo.de/page.php?pid=61051313>

Se vi estis partoprenanto, memoru la kongresajn eventojn, se ne, vidu, kion vi maltrafis!  
 Jen resumaj raportoj el la vidpunktoj de:

### 1. Prelegoj, fakaj temoj dum GEK/EEK

- Prelego pri Kubo, Juan Besada
- Prezento pri Kuba historio: Juan Besada
- Lumbildoj pri Esperanto-rondvojaĝo tra Azio: Mireille Grosjean
- Jim la migrulo: Libroprezento far prof-ro Rüdiger Sachs kaj informoj pri Serengeti-nacioparko
- Pri la gazeto Juna amiko : Stefan MacGill
- Naciaj stereotipoj kaj eŭropa identeco Zbygniew Galor
- Esperanto kiel mapilo inter du kulturoj kadre de trilingva temovortaro: D-ino Ilona Koutny
- Aktivecoj de Germana Esperanto-Junularo: Julia Hell
- Prelegoj: 20 jaroj post la murfalo En la jaro 1989 falis la muro inter oriento kaj okcidento.
- Festprelego: D-ro Sean O'Riain
- Strategio de EEU en poresperanta agado en Eŭropa Unio: Zlatko Tišljar
- Informoj pri AIS, D-ino Verá Barandovská-Frank
- La vojo al la unuiĝo de la du Germanaj Esperanto-Asocioj en la 90aj jaroj: d-ro Rudolf Fischer
- Personaj spertoj el nia iama limoregiono: Peter Zilvar
- Ĉu interkompreniĝo eblas malgraŭ miskomprenoj inter okcidentanoj kaj orientanoj? Elisabeth Schwarzer
- Kiel ŝanĝiĝis la percepto pri orienta Eŭropo ĉe la esperantlingvaj okcidentanoj? Giorgio Silfer
- Ekstermovada aplikado de Esperanto: Zdzislaw Glajcar
- Kaiserslautern la venontjara kongresurbo sin prezentas
- Purakore: poemaro de hungara poeto Attila József: Imre Szabó
- Nova universitata Esperanto trejnado en Szeged, Hungario: dr. Újvári Edit
- Lernu.net: Peter Balaz



- Seminario pri E@I: Peter Balaž
- Trejnseminario pri Vikipedio: Yves Nevelsteen
- Komputeko: Yves Nevelsteen
- Retvortaro: pastro Albrecht Kronenberger
- Prelego pri filmado: Sebastian Kirf
- Eŭro en Ĉeĥio & ĉeĥa prezidentaĵo en EU
- Prelego pri libro Esperanto per rekta metodo : Stano Marcek
- Informoj pri la saniga efiko de ginsengo: Harald Schicke
- Vojaĝoj al ambaŭ koreaj landoj: Harald Schicke
- Fakprelego pri biero kun biergustumado: Harald Schicke
- Verduloj & Esperanto / Verda Ekonomio: Dr. Manfred Westermayer
- Homeopatio (mirakla sanigo): Kees Ruig
- Informoj pri GEK/EEK 2009 & Esperanto-urbo kaj EEU: Peter Zilvar, Zsófia Kóródy
- Komuna elkonstruo de Herzberg la Esperanto-urbo. Forumo kun diskutado
- Privilegia vojo: Persistema klerigado far GEA-filio en Herzberg (kiel akiri valorajn fakdiplomojn de GEA), Peter Zilvar, Zsófia Kóródy
- Nova ĉeĥa Esperanto-muzeo: d-ro Petro Chrdle
- Ekonomia Esperanto: Hans Welling
- Ĝenerala kono de Esperanto en Francio: Cyrille Hurstel
- Ekspozicio pri Esperanto-filatelio kaj raraj E-kolektobjektoj (absoluta pinto, eksterordinara evento), Stany Rynduch
- Esperanto-ekspozicio en la kavalira salono de la Kastelo (Kun speciala Esperanto-kolektaĵo de filatelisto Kurt Zietz el Herzberg)



## 2. Kunsidoj

EEU-kunsido, EEU-sembleo

- Jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio (GEA)
- GEA: Landaj Ligoj (LALI): diskuto pri la estonto de la germana Esperanto-movado
- Jarĉefkunveno de E. Landa-Ligo en Malsupra Saksio (EMAS) Thomas Heberlein
- Kunsido de Landa Ligo REVELO
- Kunsido de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI): Zsófia Kóródy
- ILERA + AREF (Esperanto-Kolektanoj kaj Filatelistoj)

## 3. Ekskursoj

- Ekskurso per aŭtoj al Unukornulo-Groto (Einhornhöhle) en Scharzfeld
- Gvidado tra la Esperanto-urbo kun vizito de la kastela muzeo kaj de la speciala Esperanto-ekspozicio
- Gvidata promenado sur la rondvojo Akvo-8
- Matenaj kur-horoj kun Henryk Wenzel
- Busekskurso tra la Harz-montaro al Goslar, urbo de mondkulturheredaĵo





- Busekskurso al la Eŭropa Rozario en Sangerhausen, poste vizito al la grandega Kyffhäuser-Monumento
- Komuna trajnekskurso al Braunschweig kun gvidado, vizito de muzeoj kaj historia malnovurbo

Kromaj rekomendoj estis:

komunaj ekskursoj, ekz. al la Rhume-fonto kaj al la historia urbo Duderstadt (20 km) aŭ Göttingen (35 km). Migrado sur la proksima monto Knollen, al Hanskühnenburg ĉe Lonau.

#### 4. Kulturaj kaj distraj programofertoj

- Boule-ludado ĉe la Boule-ludejo apud Jues-lago
- Interkona vespero sub gvidado de kantisto Ralph Glomp
- Grekaj kantoj de German-Greka Koruso el Herzberg
- La internacia Esperanto-Koruso, (projekto Vielfalt tut gut - Bunteco bonas) sub gvido de Otto Kern
- Muzikgrupoj de la gimnazio (lerneja koruso: Christian Gödeke; instrumenta grupo: Gitta Ammer)
- RYTMIX Infana Dancensemblo el Toruno
- SZENÁ-TOROK La hungara parlamenta koruso
- Georgo Handzlik la Esperanto-bardo kantas
- Speciala junulara muzikprogramo en la urba junulardomo kun la diskĵokeoj Erik & Leo, junularprogramo sub gvidado de Julia Hell, GEJ-prezidantino



- Filatelista evento, aparta poŝtstampo pro la E-kongreso
- Ekspozicio pri Esperanto-filatelo en la urba biblioteko
- Ekumena Diservo, pastro Albrecht Kronenberger kaj pastoro Peter Bäß, Sankta Jozefo-Kirko
- Bunta kulturvespero -Ulrich Mattke Pianoludado, Alfons Hoffmann Kantado, Harzklub Pöhlde prezentas sin, Ralph Glomp, fama E-kantisto el Hamburgo, Klezmorim Sennomaj sub gvido de Peter Bäß el Berlin
- Komuna kantado de Internacia Esperanto-Koruso kun ĉ. 100 infanoj kaj plenkreskuloj sur bazara placo apud la urbodomo, (projekto Vielfalt tut gut - Bunteco bonas) sub gvido de Otto Kern
- Partopreno ĉe la urba festparado, kun kostumoj, flagoj, varbombreloj
- Teatra vespero: Münchhausen la vera kazo. Teatra spektaklo, Christoph Frank
- Aŭkcio de libroj kaj brokantaĵoj je favoro de Esperanto-urbo
- Bunta adiaŭa vespero (gvidis Stany Rynduch), Dancprezentado de la premiita grupo Baby Jagi el Toruno, Georgo Handzlik la Esperanto-bardo, unuopuloj kaj grupoj
- Adiaŭa piroteknikaĵo

**Peter Zilvar, Zsófia Kóródy**



**8A EEU-KONGRESO, HERZBERG, 30 MAJO 2009****Prelego de la prezidanto de EEU, D-ro Seán Ó Riain en Esperanto-urbo**

Estimataj gesinjoroj, karaj geamikoj,

Unue mi diros kelkajn vortojn irlande por substreki la gravecon de lingva diverseco en Eŭropo. Ni neniam forgesu tion.

Irlande: Is mór an chúis áthais dom bheith ar ais i gcathair álainn Herzberg do chomhdháil Esperanto na hEorpa. Gabhaim buíochas ó chroí leis an gCoiste Eagrúcháin as an sár-ullmhúchán. Tá súil agam go mbeidh comhdháil úsáideach thaitneamhach againn go léir, a rachaidh go mór chun tairbhe Esperanto agus do chomh-chearta teanga san Eoraip.

Mi intencas mallonge

1. mencii kelkajn interesajn lastatempajn lingvopolitikajn evoluojn en EU;
2. priparoli kiel Esperanto povus pliefikigi la Eŭropan Union kaj kontribui al ties integriĝo;
3. proponi konkretajn agadojn.

Sed antaŭ ĉio, mi volas aŭdi viajn ideojn kaj proponojn.

#### 1. Lastatempaj Lingvopolitikaj Evoluoj en EU

1. Publikigo de la libro *A Concise Encyclopaedia of the original literature of Esperanto*, fare de D-ro Geoffrey Sutton, Mondial, Novjorko. Ĉar unu el la ĉefaj argumentoj de kontraŭuloj de Esperanto estas ties tiel-nomata “manko de kulturo”, endas montri kiom Esperanto kontribua al la interkultura dialogo, kaj tiu libro estas solida pruvo de la ‘kultureco’ de Esperanto. Tiu argumento neglektas la interlingvistikan esploradojn, ekzemple la verko de D-ro Blanke pri la 28 etapoj tra kiuj Esperanto iris survoje de projekto al vivanta lingvo – unu el ili estis, ĝuste, “originala kulturo”.

2. Publikigo de la libro *Komuna Europa Referenckadro por lingvoj en EO*. Tio aparte gravas ĉar per ĝi la Konsilio de Eŭropo agnoskas Esperanton samnivele kiel aliaj vivantaj lingvoj. Mi forte rekomendas al vi aĉeti tiun libron, kaj almenaŭ submetiĝi al la lingva ekzameno, au chi-tie en Herzberg, au dum la UK julie.

3. EP-elektoj. Gravus ke EDE nun partoprenas la elektojn en Germanio, kaj ne nur en Francio, kaj ke nia Nobelpremiito, Prof. Reinhard Selten, okupas la unuan lokon en Germanio. Pro tiu partopreno, pli ol 64 milionoj da germanaj voĉdonantoj vidos la vorton “ESPERANTO” sur la balotiloj, kaj la amaskomunikiloj multe raportis pri nia lingvo. Kiel vi scias, EEU estas politike neŭtrala, ni rekomendas al Esperantistoj aktiviĝi politike, aŭ en EDE aŭ iu alia politika partio.

4. Eŭropa Parlamento: La 14-an de julio 2008 okazis diskuto: “Esperanto: amiko au malamiko de plurlingveco?” Pro la tragika morto en trafikakcidento la 13-an de julio de Prof. Bronislaw Geremek, pli ol duono de la diskuto estis por honorigi Geremek mem. Sed, ege signifa estas, ke la lasta mesaĝo de Geremek, vicprezidanto de Eŭropa Parlamento, al siaj 874 gekolegoj en la Parlamento, estis invito al diskuto pri Esperanto.

5. Formala propono de Slovakio diskuti EU-lingvopolitikon je la inter-registara nivelo. La propono venis la 26-an de marto 2007 en letero de slovaka vic-ĉefministro Ĉaplović al siaj kolegoj en ĉiuj 26 aliaj EU-registaroj kaj al ĉiuj anoj de la Eŭropa Komisiono. Li alkroĉis al sia letero la konkludojn de la bratislava konferenco de novembro 2006 - la unuan fojon ke EU-

registaro (Slovakio) organizis konferencon kie Esperanto rolis kiel unu el la plenrajtigitaj laborlingvoj.

6. Profesoro Selten en la Eŭropa Parlamento: La 9-an de majo 2007 dum evento por honorigi eŭropajn nobelpremiitojn en la Eŭropa Parlamento, la germana nobelpremiito profesoro Reinhard Selten multe laŭdis la ne-imageblan sukceson de la EURO, kaj malferme proponis Esperanton kiel unuan lernindan fremdan lingvon en kelkaj membroŝtatoj por plibonigi la lingvolernadon, kaj por plifortigi eŭropan identecon. Laŭ li, la dominado de iu ajn nacia lingvo estas neakceptebla. Profesoro Selten nuntempe gvidas la liston de EDE en Germanio okaze de la elektoj al la Europa Parlamento. Pro li, milonoj da germanoj vidas la vorton "Esperanto" unuafoje. Ni deziru al li kaj al EDE bonan ŝancon!

7. Oktobre 2005 okazis io tre grava por la estonto de la lingvoj de Eŭropo: publikiĝis la raporto GRIN, de eminenta svisa ekonomikisto de la Universitato de Ĝenevo, kiu klare kaj science montris ke la nuna internacia pozicio de la angla lingvo kontribuas almenaŭ € 17 miliardojn jare al la brita ekonomio. Alivorte 88% de EU-civitanoj kiuj denaske parolas aliajn lingvojn subvencias Brition jare trifoje, krom la fama brita EU-buĝeta rabato. Indas substreki ke tiu monkvanto estas nur 75% de la tuta monkvanto kiun Britio gajnas, ĉar Profesoro Grin kalkulis proksimume kiom da mono donas la dominado de la angla, kaj deprenis sumon kiun donas la "natura altireco" de la angla. Kiel reago al tio, la germana EP-ano Michael Gahler postulas malpliigon de la britaj kaj irlandaj civitanoj kiuj laboras por EU institucioj, por kompensi ilian avantaĝon pro la kreskanta uzo de sia gepatra lingvo kiel lingua franca de EU. Sed eble eĉ pli grava ol tio, pro la nuna ekonomia krizo, estas alia konkludo de Grin: pro manko de rolo por neutrala eŭropa lingvo kiel EO, la 27 EU-landoj perdas €25 miliardojn jare.

8. Ne plu lastatempa, sed valoras substreki: En Februaro 2002 Britio decidis ke ĉiuj lernantoj je la aĝo de 14 rajtas ĉesi lerni iun ajn fremdan lingvon. Tio signifas ke, ĝuste kiam pli da lernejoj en aliaj landoj volas fari interŝanĝojn kun lernejoj en Britio, la britaj lernejoj malpli emas.

9. La nombro de artikoloj en Esperanto en la reta enciklopedio "vikipedio" pligrandiĝis jam al pli ol 114,000. El la 266 lingvoj en kiuj ekzistas vikipedio, Esperanto estas la 22<sup>a</sup> laŭ la grandeco.

10. En 2004 publikiĝis la nemalhavebla libro de profesoro Robert Phillipson, "English-only Europe?" (Routledge).

3. Kiel Esperanto povus pliefikigi la Eŭropan Union kaj kontribui al ties integriĝo? Almenaŭ trimaniere:

1. pli justa lingva sistemo. Ne plu estus vivolongaj, nemeritaj privilegioj, kiel donas la nuna dominado de la angla.

2. pli facila lingvolernado, pro la lernfaciligaj ecoj de Esperanto, kaj do pli efika komunikado kontinentescale.

3. plifortigo de eŭropa identeco. La angla aŭ la hispana ne povas doni tion, pro la ekstereŭropeco de la granda plimulto de denaskuloj de tiuj lingvoj. La franca, germana, itala, aŭ pola povus doni ĝin, sed ankaŭ iu ajn el ili same donus maljustan avantaĝon al denaskuloj.

Ĉar la unuaj 2 kialoj estas jam konataj kaj akceptataj de Esperantistoj, mi iom pritraktos la trian manieron, kiu estas pli kontraŭdira inter ni. Multaj samideanoj estas forte tutmondistaj, kaj ne alte taksas ian rolon por Esperanto en la plifortigado de eŭropa identeco. Sed teoriaj debatoj pri tio povas esti iom sensencaj. Kiel ni imagas mondvestan akcepton de Esperanto? Ĉu ni pensas ke estos samtempa akcepto en multaj landoj? Tio estas ege malverŝajna.

Ni komparu iomete kun la metra sistemo, kiu ja havas komunajn punktojn kun Esperanto. Unue la sistemon oficiale akceptis post-revolucia Francio en 1791. Dum la postaj 2 jarcentoj iom post iom aliaj landoj akceptis la metran sistemon, ĝis la nuna situacio kiam nur 3 landoj ankoraŭ ne akceptis ĝin: Usono, Liberio kaj Myanmar.

Se EU donus rolon al Esperanto, kaj aliaj mondpartoj ne, tiam Esperanto devige ekesprimus eŭropan identecon. Kaj se ne-eŭropanoj ne ŝatas tion, la rimedo estas atingi oficialan rolon por Esperanto en la propraj landoj.

4. Kian rolon Esperantistoj povus ludi en la antaŭenigo de Esperanto en EU?"

### Praktika Agado

La EU multfoje kaj en pluraj dokumentoj garantias la samrajtecon de civitanoj, sed la praktiko de EU ne respektas la lingvan samrajtecon. Do, la nuna prioritata agado por EEU estas

1. aparte dum la nuna financa kaj ekonomia krizo uzi la GRIN-raporton por montri la praktikajn financajn sekvojn de tiu manko de samrajteco.

2. Diskonigi kiom eble plej vaste la saĝan eldiron de nobelpremiito profesoro Reinhard Selten en la Eŭropa Parlamento la 9-an de majo 2007.

3. Verki artikolojn por Vikipedio en Esperanto, por ke ĝi atingu 130,000 artikolojn dum 2009, kaj por ke ĝi denove estu inter la 20 plej grandaj lingvoj de Vikipedio. Ĝi nun estas en la 22<sup>a</sup> loko – dum la lasta kongreso de EEU en 2007, EO havis la 15-an lokon.

4. Ĉiam altiri atenton al la lernfaciligaj ecoj de Esperanto kaj ties ebla kontribuo al la plibonigado de lingvolernado kaj tiel al la protekto de plurlingveco.

Post kelkaj monatoj, la 15-an de decembro, ni festos 150-an datrevenon de la naskiĝo de Ludoviko Zamenhof. La sekva poemo estas de verŝajne la plej eminenta poeto kiu verkis en EO dum la unua jarcento de nia lingvo, Kálmán Kalocsay. Ĝi klare substrekas la surdemutecon de la homaro, kaj la neceson, kiun ankaŭ substrekis Umberto Eco, alparoli la homaron konkrete pri la vivo de Zamenhof, kaj pri lia senĉesa laboro por la idealo de pli paca kaj harmonia homaro. Povas okazi ke ili eĉ aŭkultus nin.

*Memora fest' ... dolora fest'*

*Funebre ni solenas...*

*Ho, flugis for la flam' de l'kor*

*Kiun ni larme benas.*

*Nun nek kanon' kun tondra son'*

*Nek sonoriloj festas...*

*Nur batsonor' de nia kor'*

*Pri la solen' atestas.*

*En vastas mond' malgranda rond'*

*Ja estas ni, la fratoj,*

*Sed kun potenc' en sankta senc'*

*Kuniĝas la korbatoj.*

*Ho, kunsonor' de nia kor'!*

*Funebru la Benatan,*

*Per kies am', jen, flagra flam'*

*Kunfandis rondon fratan.*

*Estingis sin la flam' de l' sin',*

*Plu arde ĝi ne hardas,*

*Sed jen la Verk', ĝi malgraŭ ĉerk'*

*Kaj malgraŭ frostoj – ardas!*

*Ĝin vartu ni, ho, ardu ĝi,*

*Ke el malgranda sfero*

*Post vintra frost' la Pentekost'*

*Alvenu sur la Tero,*

*Kaj en kompren', eterna ben'*

*Frati ĝu mondo tuta...*

*Ni laŭdu Lin, ke aŭdu nin*

*Homaro surdemuta!*

Seán Ó Riain

## SVEDA ESPERANTO-KONGRESO

La Sveda Esperanto-kongreso estas kunlaboro inter Esperanto-organizoj en Svedio. La kongreso okazis inter la 22a kaj la 24-a de majo 2009 en popolaltlernejo de Fornby en Borlänge, Dalekarlajo. Ĉirkaŭ 60 personoj ĉeestis kaj okazis dum tiuj tagoj samloke ankaŭ kunvenoj de svedaj Esperanto organizoj.

- SEF, Sveda Esperanto-Federacio , havis sian jarkunvenon
- SEJU, Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo havis sian Anemona-renkontiĝon
- ELDONA, Eldona Societo Esperanto - havis sian jarkunvenon
- E-G, Esperanto-Gården (E-G), havis malfruan jarkunvenon
- ILEI, Sveda sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, havis sian membrokunvenon
- SEI, Sveda Esperanto-Instituto (SEI), havis sian jarkunvenon kaj aranĝis plankunvenon kun gruplaboroj
- KELI, Sveda sekcio de KELI, havis sian jarkunvenon



Inter tre interesaj programeroj estis prelegoj:

- Projekto Lingvolanĉilo (angle "Springboard to Languages") de sinjoro Paŭlo Gubbins el Britujo. Tiu prelego estas vere imitinda kaj ripetinda multloke en aliaj landoj!
- Ĝardena fervojkonstrua projekto de sinjoro Paŭlo Gubbins el Britujo. Amuza prezento pri ĝi kun multaj bonaj fotoj, kelkaj surprizaj. Vidu pli ĉe Youtube: "Garden Railway - Roundhouse Lady Anne first run SM32 16mm"
- Lingvolernado en la interreto de sinjoro Konstantin Andreev el Rusio kaj Svedio. Prelego impona de ruso kiu loĝas de antaŭ unu kaj duona jaroj en Svedio kaj antaŭ nur du monatoj kaj dek tagoj komencis lerni Esperanton. Ĉiujn aŭskultantojn imponis lia flue bona lingvonivelo. La temo de la prelego estis grava; temis pri lingvolernado per interreto, en kiu altlernejo (universitato) de Faluno estas elstare sukcesa kaj havas studentojn de diversaj kontinentoj kaj eĉ atingis organizi por svedoj kurson pri la kopta (praegipta) lingvo. La evidentaj demandoj estis, kiel oni povas tian sukceson realigi ankaŭ por Esperanto, kaj kiel eblas kupli tion al nia kara lernu.net.

Aliaj programeroj estis:

- Librotablo – prizorgis Karin kaj Thomas Tulkiewicz
- Kurso por komencantoj – prizorgis Roland Lindblom
- Distraĵoj, komuna kantado, komuna dancado, folkloro muziko – prizorgis Mhedi Martin Strid

La impresoj estis ke la partoprenantoj kontentis pri la kongreso kaj ŝatis ĝian etoson.

**Kaisa Hansen**

## **EDE SUR LA FLANKO DE LA KRESKANTAJ PARTIOJ EN LA EU**

La franca kaj germana EDE (Eŭropo Demokratio Esperanto) estas je la flanko de la gajnintaj partioj ĉe la Eŭropaj Balotoj.

Sed ne en la sama direkto kiel la plejmultaj, precipe nacie konservativaj, ofte eĉ dekstre radikalaj partioj. EDE kreskis (se ankaŭ nur minimume sed tamen) naĝante kontraŭ la nuntempe ĝenerala kontraŭeŭropa fluo, por Eŭropo.

EDE povis modeste kreski je la flanko de la meza linio de la internacieco. Ankaŭ se tiu strebo estas kontraŭ la ĝenerala intenco nuntempe en la EU, ĝi tre gravas por la protekto kaj defendo de la demokratio ĝenerale por ne perdi la ŝancon rekonstrui nian oldan Eŭropon, per nova internacia demokratio.

En Francio EDE akiris plus 4.001 voĉojn, aŭ 0,02 % pli ol en 2004.

En Germanio la EDE akiris plus 11.859, aŭ 0,045 % pli da voĉoj ol 2004, kiam ili ne povis partopreni la balotojn ĉar ne atingis la nombron de la necesaj subskriboj.

Ankaŭ se la EDE-anoj ĝenerale esperis ricevi pli da voĉoj, se oni analizas la cirkonstancojn en kiuj ili faris sian kampanjon kaj komparas iliajn eblojn kun la aliaj partioj, oni devas esti kontenta kun la atingita rezulto.

En Germanio ekzistas ekzemple nur 30 aktivaj EDE-anoj kaj ili elspezis por la balotoj ne pli ol 10.000 eŭroj. Por la komparo: CDU, la nun plej granda partio en Germanio, elspezis 1.000.000 da eŭroj por la eŭropaj balotoj. Malgranda alia kalkulo: Ĉe la EDE venas 400 voĉoj al unu membro. Por komparo; ĉe la verduloj 70 voĉoj/membro.

Bedaŭrinde eĉ grandaj demokratiaj partioj menciis apud la plejparte naciaj temoj nur rande tuteŭropajn problemojn kaj interesojn (ni ne forgesu ĉe Eŭropaj Balotoj). En la tuta Eŭropa Unio alparolis nur du kandidatoj la internacian demokration, la EDE kaj la Newropeans, tiuj ankaŭ nur en Francio kaj Germanio. Fakte jes, la plej grandaj kaj evoluintaj landoj en la EU, sed tamen ankaŭ eĉ tie montriĝis en la demokratia baloto la malalta ĝenerala nivelo de la internacia konscio de la civitanoj.

Pro tio, se ni en la estonto plu volas havi Eŭropan Union kaj ĝin alkonstrui al demokratie vivkapabla lando de la mondo, ni havos ankoraŭ multe da laboro. Ĉiuj tiuj, kiuj jam havas kelkajn internaciajn spertojn kaj atingis iun internacian konscion, tion pludonu kaj helpu al tiuj civitanoj kiuj ĝis nun ne havis la eblojn por tiuj spertoj. Oni povas diversmaniere komenci evoluigi tiun konscion, sed la plej senpere alirebla estas por la plejmulto da civitanoj, demokratie, per Esperanto. Pro tio havas EDE en sia programo, kiel unu el la plej gravaj taskoj, per la politiko disvastigi Esperanton en Eŭropa Unio.

### **Eŭgeno Macko**

#### **EDE en Alzaco**

Sekve al la balotado ni ricevas bonajn novaĵojn el Alzaco. Ekde septembro Esperanto estos enkondukita kiel studfako en la universitato de Mulhausen kiel volontula paroliga kurso por oficistoj de la Konsilode Europano (Sidejo en Strasburgo) en la kadro de aktivaĵoj, kiujn la unuiĝo de la Eŭropkonsiliaj kunmembroj proponas al la lokaj oficistoj. Ankaŭ mi aŭdis, ke ne-malmultaj instruistoj de la Strasburga universitato ŝatus sin dediĉi por sekvi la instruadon de Esperanto.

Ĉi-tiu novaĵo estas des pli entuziasmiga, ĉar Strasburgo iel estas Eŭropa urbo (kun institucioj de Eŭropa Parlamento).

### **Fabien Tschudy**



## MARGARETA HANDZLIK REELEKTITA AL EŬROPA PARLAMENTO

Margareta (Malgorzata) Handzlik estis dum la junia baloto por Eŭropa Parlamento reelektita por plia 5-jara mandato. Ŝi estis kandidato de la ĉefa dekstra pola partio, kiu ricevis pli ol 50% de ĉiuj polaj parlamentanoj. Tio estas gravega novaĵo por la E-movado en Eŭropo, ĉar ĝi ebligas plian rektan kontaktadon kun tiu ĉi plej supera demokrata instanco de Eŭropa Unio far Esperanto-movado. Bedaŭrinde la dua ĝisnuna eŭropa parlamentano esperantisto, Ljudmila Novak el Slovenio ne estis reelektita, sed nerektan influon al la slovenaj deputitoj esperantistoj plu havos. Ŝi nome nun estas prezidantino de la partio Nova Slovenio kiu tamen gajnis unu parlamentanon en la Eŭropa parlamento, kaj tiu estas sinjoro Alojz Peterle. Ĉar ni plu estas en daŭraj kontaktoj kun sinjorino Novak, ni povas peti ŝin, ke ŝi petu sinjoron Peterle subteni esperantistajn iniciatojn en la Eŭropa parlamento.



Eble inter la novelektitaj parlamentanoj estas ankoraŭ iu esperantisto aŭ subtenanto de Esperanto, sed tion ni devos unue esplori. La estraro de EEU planas starti pri informado de la parlamentanoj rilate Esperanton jam en septembro kaj serĉi manieron starigi interparlamentan grupon pri justa lingva sistemo.

**Zlatko Tišljar**

## ALVOKO AL PLASTERK POR LA NEDERLANDA EN UNIVERSITATOJ

Hago - Dekkvar universitataj profesoroj alvokis ministron Ronald Plasterk (Instruado, Kulturo, Scienco) elpaŝi por garantii la uzadon de la nederlanda lingvo en la universitatoj. „La scienca, kultura kaj socia intereso de Nederlando kaj de ĉiuj nederlandanoj domaĝatas je la plua ekzistado de la nederlanda kiel instrulingvo de la sciencoj”, tiel la kompanio.

La kreskanta uzado de la angla jam antaŭe estis metita ĉe la pilorio. “Ne nur multaj publikigaĵoj aperas en la angla, dume studentoj ankaŭ skribas siajn studeseojn en la angla kaj ili aldonas al siaj laboraĵoj anglalingvajn resumojn, kaj samtempe lekcionoj estas prezentataj en la angla, kiam ĉeestas studentoj kiuj ne komprenas la nederlandan kaj gradokreske eĉ se ne estas tiel”, nun ankaŭ notas la profesoroj.

Ili konscias ke neniu povas lasi la anglan. “Ni estas realemluloj kiuj plene rekonas la nenegeblan kaj fruktodonan rolon de la angla kiel libera lingvo por la sciencoj. Granda parto ankaŭ de niaj propraj publikigaĵoj estas verkitaj en la angla.”

Sed oni tamen devus uzi ‘la nederlandan, ĉar ne se ...’, ili opinias.

Tiu-ĉi diskuto memorigas min pri la averto de José Antonio Vergara, dum debateto en Jokohamo, ke defendantoj de nacilingvoj ĉefe venas al dekstruma angulo, do ke UEA ne asociiĝu kun ili. Povas esti ke tio estas (estis ?) la kazo en Ĉilio, sed ne en multaj aliaj landoj.

**Johan Derks**

## **ESPERANTO EN NACISKALA VIDEOKONFERENCO**

**Tiel raportis Carlos Maria pri la videokonferenco en Brazila Senato, kiu nun diskutas pri la propono de la senatano Cristóvam Buarque pri enkonduko de Esperanto en la mezlernejan sistemon de Brazilo.**

Okazis la 19an de junio 2009 - de la 9h30 ĝis la 12h - videokonferenco en Aŭditorio Antônio Carlos Magalhães, situata en Brasília/DF. Temis pri La lingvaj baroj kaj Esperanto. Enkondukis la temon la jenaj konferencanoj: Senatano Cristóvam Buarque, s-ro. Ivônio Barros Nunes – Asesoro de la Senatano, profesoro José Passini – prezidanto de Brazila Esperanto Ligo kaj profesoro Paulo Nascentes – reprezentante la organizon União Planetária kaj TV Supren. La evento estis spektata de esperantistoj de kelkaj brazilaj ŝtat-ĉefurboj kunsidantaj en la Leĝdonaj Asembleoj de ĉiu Ŝtato. Tiuj de la urboj Goiânia kaj Natal havis la oportunon interagi kun la konferencanoj. Teknikaj problemoj malpermesis la kontakton kun esperantistoj de Rio de Janeiro. Por akompani proksime la videokonferencon, 30 esperantistoj ĉeestis la auditorion de Interlegis.

Senatano Cristóvam lasis la jenan mesaĝon al la esperantistaro: Tre gravas, ke la esperantistoj mesaĝu al ĉiuj brazilaj senatanoj por peti apogon al la leĝo PLS n° 27 de 2008, kiu modifas la Leĝon n° 9.394, de la 20a de decembro 1996, por disponi pri la inkludo de la nedevisa instruado de Esperanto kadre de mezgrada instruado.

### **La sesio**

Post spektado de video preparita de la Kabineto de la senatano Cristovam, profesoro Passini sinteze enkondukis la temon, reliefigante la gravecon de la instruado de Esperanto por solvi la lingvobaron inter malsamlingvuloj. Miaflanke, post la propono pri alĝustigo de la esprimo "lingvo kiu unuecigu la planedon" al "ĉies dua lingvo", mi defendis la neceson de egalrajta kaj neŭtrala lingvo internacia kadre de sperto de tutmonda civitaneco. Poste mi komentis ion pri la sciencaj argumentoj prezentataj en la libro de profesoro Passini, "Bilinguismo: utopia ou solução?", pri la novtipa ekzamensistemo por fremdaj lingvoj kadre de Komuna Eŭropa Referenckadro, kiu inkluzivas Esperanton kaj fine incitis prof-ron Passini komenti la uzon de aŭdiloj dum internaciaj kunsidoj kaj ĝeneralaj asembleoj kadre de sesioj, ekzemple, de Eŭropa Parlamento kaj Unuiĝintaj Nacioj. Ĉu tio ĉiutage montrata de amaskomunikiloj ne pruvas, ke la nuna 'solvo' de la monda lingva sistemo estas mensogo? Passini memoris pri personaj spertoj dum fakaj internaciaj konferencoj kun sinsekvaj tradukoj kaj ties fiasko el komunika vidpunkto, foje kun multaj ridoj pro tradukaj eraroj.

### **La partopreno de ĉeestantoj en Ŝtataj Leĝodomoj**

Partoprenanto de Natal (Rio Grande do Norte) kaj aliaj de Goiânia (Goiás) demandis pri similaj urbaj leĝoj, pri la preparado de E-instruistoj kaj pri Manifesto de Prago. Profesoro Passini brile parolis pri tiaj urbaj spertoj kaj pri kiel li mem fariĝis instruisto kaj poste profesoro pri Esperanto. Pri Manifesto de Prago sinteze mi asertis tion, ke danke al ĝiaj sep punktoj mi fariĝis esperantisto kaj poste instruisto de Esperanto, ĉar antaŭ tio jam mi estis profesoro pri la Portugala ĉe UnB - Universitato de Brasília.

Iom poste alvenis prof-ro Cristovam Buarque, kiu salutis per "bonan tagon!" kaj atentigis ĉiujn pri gravaj mankoj ĉe publika eduksistemo, komentis pri alia Leĝo de li proponita pri la instruado de Libras (Brazila Lingvo por Surdomutuloj) kaj instigis la esperantistojn esperantigi libreton lian kaj amase mesaĝi al aliaj parlamentanoj kaj ilin premi por la aprobo de lia Leĝopropono pri Esperanto.

## ANALIZO DE EU-KONSULTIĜOJ LAŬ TEMOJ

En unuaj tri monatoj de 2009 okazis stimulata de EU enketado en ĉiuj landoj de EU pri la temoj kiujn la civitanoj trovas prioritataj por politikistoj de EU (kiel esploro antaŭ la balotoj por la Eŭropa Parlamento). Mi rigardis ĉiujn 27 landajn paĝarojn kun la rezultoj kaj faris la jenan analizon.

Prenate en konsideron unuajn kvin temojn laŭ la multeco de voĉdonoj en 22 EU-landoj (mankas Latvio, Litovio, Grekio, Cipro kaj Malto) jen la ranglisto de temoj trovitaj:

- |   |   |
|---|---|
| 1. Esperanto: konsideri Esperanton kiel lingva helpilo en EU : 22 landoj havis tiun temon el kiuj en 16 je unua pozicio | 18. Nuligi koridojn (1)                               |
| 2. Leĝigo de marihuano (en 9 landoj el kio en 2 landoj 1-a pozicio)   | 19. Fari en EU zonon sen OGM (FR) (1)                 |
| 3. Starigo de agentejo por kontroli impostojn en 7 landoj (neniu unua pozicio)  | 20. Permesi abortigon (1)                             |
| 4. Pli da okupiĝado kaj financado de ekologiaj temoj (en 6 landoj)  | 21. Pli zorgi pri homaj rajtoj (1)                    |
| 5. Solvi la financekonomian krizon (en 5 landoj)  | 22. Homaj rajtoj por nenaskitoj (1)                   |
| 6. Batalo kontraŭ malriĉeco (en 5 landoj)   | 23. Malpli da trafiko por purigi la aeron (1)         |
| 7. Fari pli por evoluigi volontulecon (en 3 landoj)   | 24. Eŭropa Parlamento sen »dondannati« (IT) (1)       |
| 8. Lerni pri Eŭropo en lernejoj (en 3 landoj)   | 25. Infana vilaĝo por eŭropaj civitanoj (1)           |
| 9. Rekoni rajtojn de bestoj (en 3 landoj)   | 26. Malpermesi »rook« (NL) (1)                        |
| 10. Batalo kontraŭ diskriminacio de virinoj (2)   | 27. Eŭro (PL) (1)                                     |
| 11. Pli da socialaj rajtoj (2)  | 28. Solvi energiproblemon pri gaso (1)                |
| 12. Forigi nukleajn elektrajn centralojn (2)  | 29. Eduki pri komuna eŭropa historio (1)              |
| 13. Fini subvencii agrikulturon (2)   | 30. Rreligio en lernejoj (1)                          |
| 14. Doni laboron al gejunuloj (1)   | 31. Salajroj egalaj kun EU (1)                        |
| 15. Garantii bazajn 4 liberojn (1)  | 32. Pli altaj pensioj (1)                             |
| 16. Lerni pri solidareco (1)  | 33. Batalo kontraŭ korupto (1)                        |
| 17. Batali kontraŭ genetike prilaboritaj nutraĵoj (1)   | 34. Defendo de konsumantaj rajtoj (1)                 |
|   | 35. Uzi liberan softvaron en administrado (1)         |
|   | 36. Sankcii monopolon en telekomunikado (1)           |
|   | 37. Medicino patentoj ? (Sv) (1)                      |
|   | 38. Starigi profesion el edukado de infanoj hejme (1) |
|   | 39. Fortigi demokration (1)                           |
|   | 40. Haltigi ŝtatan burokrativastiĝon (1)              |

Mi ne analizis 5 landojn ĉefe pro tio ke iliajn lingvojn mi neniel povis deĉifri.

Restis 11 temoj en la menciitaj 22 landoj kiujn mi ne komprenis (verŝajne ili ne grave ŝanĝus la rangordon).

Evidentos por EU-fakuloj ke por Esperanto okazis organizita kampanjo (speciale en Hungario kie unuajn 4 poziciojn okupis 4 diversaj proponoj pri Esperanto), sed ĝi devus signali al la EU-ĉefuloj ke esperantistoj estas grava forto, ĉar ili kapablas engaĝi tiom da interesitoj por sia afero.

Evidentos ankaŭ ke ankaŭ kampanjon organizis iu grupo kiu en 7 landoj voĉdonigis kvardekon da homoj por sia propono pri starigo de Eŭropa Agentejo por kontroli impostojn – kio montras efektive kiel febla estas tia maniero esplori la publikan opinion, se nur 40 homoj povas esence influi la statistikon. Eĉ la fakto ke en Francio voĉdonis preskaŭ 800 homoj por Esperanto, (kaj la unualoka propono ricevis iom pli ol 3000), do Esperanto gajnis 25% da voĉoj kompare kun la plej forta propono – montras ke pri tiaspecaj enketoj interesiĝas tre malmultaj civitanoj. Entute

laŭ mi en la voĉdonado partoprenis ĉirkaŭ 100.000 homoj kio estas 0,5 promiloj aŭ 0,05 % de la eŭropa loĝantaro.

Se ni sumas la tutan voĉdonantaron por ĉiuj Esperanto-proponoj en la 22 landoj ni ricevas 5262 voĉojn kio estas en la tuta sumo de voĉoj 5%. Se ni ricevas 5% da voĉoj en balotoj, nia partio rajtus eniri la parlamenton! Inter tiuj voĉoj estas ĉirkaŭ 100 personoj kiuj voĉdonis solidarece en preskaŭ ĉiuj listoj. El tiu kaj similaj voĉdonadoj en aliaj poresperantaj proponoj en kiuj simile kelkmil esperantistoj voĉdonis, mi povas konkludi ke ekzistas ĉirkaŭ 3-4000 esperantistoj en interreto kiuj aktive sekvas la okazadojn kaj kunlaboras en la interreto. Tion konfirmas ankaŭ la blogaro ipernity en kiu membras plej granda kvanto da esperantistoj kun ĉirkaŭ 3000 membroj kaj ankaŭ la fakto ke ekzistas ĉirkaŭ 300 diversaj elektronikaj listoj en kiuj membras de kelkdeko ĝis kelkcento da membroj.

Mirindaĵo estas unuaj pozicioj por Esperanto en grandegaj landoj kia Germanio, Italio kaj Britio. Tio montras antaŭ ĉio katastrofe malaltan intereson de tiuj popoloj por Eŭropa Unio kaj aktiva civitaneco.

Bedaurinde, la organizantoj de la enketado ne poste publikigis la rezultojn, kvankam la celo estis diskonigi la dezirojn de la civitanoj al kandidatoj por Eŭropa Parlamento. Eble tion aŭtune faru EEU – ni informu la EP-anojn pri la rezultoj.

**Zlatko Tišljarić**

## ESPERANTO EN LA BIBLIOTEKOJN EN ITALIO



Itala Esperanto-Federacio jam de longa tempo zorgas pri kontaktoj kun italaj bibliotekoj kaj kelkaj el ili regule ricevas la italan Esperanto-revuon.

En la pasinta jaro la Nacia Konsilantaro de IEF lanĉis kampanjon por donaci librojn pri Esperanto al bibliotekaj pretaj akcepti ilin. La kampanjon kunordigis la nacia konsilanto Ermigi Rodari, kiu pere de lokaj esperantistoj enketis pri la emo de la bibliotekoj ricevi librojn pri Esperanto kaj meti ilin en la bibliotekan katalogon. La sukceso estis rimarkinda.

109 bibliotekoj akceptis niajn librojn kaj la direktoroj de kelkaj el ili eĉ dankis skribe.

Oni donacis 86 lernolibrojn de Migliorini, 107 vortarojn

Corsetti-Vessella, 106 ekzemplerojn de la verko de Janton en la itala, "Esperanto: lingua, letteratura, movimento" kaj ankaŭ kelkaj aliaj verkoj al bibliotekoj, kiuj jam posedis unu el la unue cititaj verkoj.

Kompreneble oni ankaŭ donacis abonojn al la itala Esperanto-revuo por la bibliotekoj, kiuj petis tion.

La pozitiva sperto instigas al aliaj similaj agadoj. Gravega estas la rolo kaj de la kunordiganto kaj de la lokaj esperantistoj, kiuj plenumas la esencajn lokajn kontaktojn.

**Renato Corsetti**

## AVE - 25 JAROJ DA KUNLABORO KUN LA VERDAJ PARTIOJ TUTMONDE



AVE estis fondita en Marto de 1984 en Lishge (Belgio) okaze de la unua renkontiĝo de la Eŭropaj Verdaj Partioj. El la fondintoj: Maire Mullarney (1922 - 2008, la koro de AVE, kunfondinto de la irlanda Verda Partio), Christopher Fettes (unua redaktoro de AVE-NOvaĵoj, AVENO), Jean-Claude Thumerelle (unua sekretario), Wolfgang Guenther, Ute Haas, Emilo Mas kaj Claude Rouget (kiu eldonis VERDire). AVE-anoj kunvenas enkadre de la kongresoj de la Eŭropaj kaj Tutmondaj Verdaj Partioj. Bonkvalita interpretado de la ĉefaj prelegoj i.a. en Esperanton okazis 1991 je la unua Eŭropa Kongreso de la Verdaj Partioj en Zuriko fare de Claude Gacon kaj Claude Piron, kion ebligis niaj geamikoj el Francio kaj la svisa Verdulo Hans Beat Schaffner. Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne estas tiom multaj por postuli tion regule. AVE k.a. almenaŭ sukcesis ke la Eŭropaj Verduloj

akceptis kelkajn rezoluciojn favore al la uzado de Esperanto en la Eŭropa Unio. La franca (1999) kaj la germana (2009\*) Verda Partio enmetis Esperanton en siajn Eŭropo-Programojn. Aliflanke AVE tradukas gravajn dokumentojn de la Verdaj Partioj, inkluzive de iliaj Eŭropa kaj Tutmonda Organizaĵoj, kaj tiel ankriĝas per ret-ligoj en iliaj retejoj. Je la kongreso en Zuriko Manfred Westermayer transprenis la AVE-sekretarion. Dum la AVE-kunsido 2003 en Gotenburgo, okaze de la 88a UK, majoritato konfirmis la ne-formalan statuson de AVE, kio poste estis konfirmita per voĉdono inter la membroj. Tiel ni evitas burokratajn aferojn. Pere de la tradukado de gravaj Verdulaj dokumentoj ni informas la samideanojn pri la Verda Alternativo cele al daŭrigebla estonteco, kaj aliflanke ni montras al la Verduloj ke Esperanto kun siaj neŭtraleca lingvo kaj malpeza sed bonkvalita strukturo optimale agordas al la Verda ideologio de paca kunvivado kaj ekologia daŭropoveco. Kompreneble AVE kunlaboras ankaŭ kun diversaj Esperanto-Organizaĵoj kiel UEA, SAT kaj EEU; kaj regule AVE kontribuas pere de kunsidoj kaj prelegoj enkadre de iliaj kongresoj, ekz-e en Maribor (EEU 2007) pri la temo "Akvo kaj plastaĵoj". i ankaŭ kunvenis enkadre de ekologiaj okazaĵoj kiel "Ekologio kaj Turismo" (Riga) kaj kunvenos 2009-08-22 okaze de "Ekotur" (Svitavy, org-o: P. Chrdle). Rilate Eŭropan Union, por subteni la atingon de federa sistemo, ni agas kunlabore kun EEU kaj samcele kun UFE (Unuiĝo de Federistoj Eŭropaj), reprezentata de Johano-Karlo Rinaldo. AVE havas ĉ. 350 membroj kaj abonantoj de la bulteneto AVENO. Nia retejo kolektas la plej gravajn dokumentojn kaj informojn, kaj krome AVE dissendas informojn per ret-mesaĝoj. Por membriĝi al AVE oni devus (sed ne devas) esti membro de iu Verda Partio; la membroj devas akcepti la "Verdan Filozofion" kaj la "Celojn" de AVE\*\*. Abono de AVENO eblas al ĉiuj. \*) AVE sukcesis amendi la Eŭropo-Programon (ĉapitro Kulturo kaj Edukado) de Buendnis 90 / Die Gruenen (la Verda Partio en Germanio) "... Kultura diverseco estas vivanta kaj oni ne rajtas redukti ĝin al nura folkloro au al la protekto de merkataj nomoj kiel Kamemberto, Fetao, Hallumio. La bazo kaj esprimo de la kultura diverseco estas la lingvoj de Eŭropo, ne sole la lingvoj de la plimulto-socioj, sed ankaŭ de la minoritatoj kaj krome Esperanto kiel internacia lingvo de la interpopola komunikado. Plurlingveco estas forte subtenenda. ..."

[www.gruene.de/fileadmin/user\\_upload/Dokumente/Europawahlprogramm/Europawahlprogram.pdf](http://www.gruene.de/fileadmin/user_upload/Dokumente/Europawahlprogramm/Europawahlprogram.pdf)



**Verda Filozofio de AVE:**

- Realigo de pensado kaj agado laŭ la principo, ke la vivo kaj ne (sole) la homo devas esti la centra kaj pivota punkto de ĉiu evoluo sur tiu ĉi planedo.
- Esperanto kiel internacia komunikilo per siaj ecoj "lingva neŭtraleco" kaj "mondvasta aplikebla facileco" adekvatas al la ekologia principo "Eta estas Bela".

**Celoj de AVE:**

- Uzado kaj plivastigado de Esperanto kiel internacia komunikilo ene de Verda Movado, movado bazita sur ekologiaj principoj.
- Peranta agado inter la Verda Movado kaj la Esperanto-Movado.
- Enkonduki en la UEA-statuton la amendon, kiu metas la "ekologiajn necesojn kaj bezonojn, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj" en la saman rangon kiel la nociojn de paco kaj de la Homaj Rajtoj kaj deklaras ilin bazo de la UEA-laboro.

**Asocio de Verduloj Esperantistaj**  
**Manfred Westermayer**

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

Finredaktita: la 8-an de julio 2009.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljarić, Manfred Westermayer, Peter Zilvar, Zsófia Kóródy, Seán Ó Riain, Eŭgeno Mackon kaj Fabien Tschudy, Johan Derks, Renato Corsetti, Kaisa Hansen kaj Vesna Obradović

Kontakto: [vesna.obradovic@gmail.com](mailto:vesna.obradovic@gmail.com)

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, [www.eŭropo.eŭ](http://www.eŭropo.eŭ)



**Kun-financata de Eŭropa Unio kadre de la programo "Eŭropo por Civitanoj"2007 – 2013.**